

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

9

1994

中國報

EL POPOLA

ĈINIO





Abelo sur floro

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

Kvankam mi estas alia urbo. 90-jara, mi legas ĉiam kun plezuro vian interesan revuon. Post legado mi donas la revuon al mia 31-jara nepo, kiu loĝos baldaŭ en

Mi deziras bonan sukceson al "El Popola Ĉinio" kaj kore dankas la laborantojn de la revuo.

ELOI THIOILLIÈRE

(Francio)

En sia 90-jara aĝo s-ro Thiollière ankoraŭ serioze legas nian revuon, ni fieras pro tia fidela leganto. Li donis la de li legitan revuon al sia nepo, kio grandigis la legantaron de EPĈ. Ni kredas, ke lia nepo fariĝos fidela leganto same kiel li. Ni ankaŭ bonvenigas kritikojn kaj proponojn de s-ro Thiollière.

La Red.

La artikolo "Kiel Konservivi Vivajn Fiŝojn?" en la rubriko "Mem Provu" de EPĈ 5/94 ne plaĉas al mi. Mi pensas, ke la plimulto de ni eŭropanoj sentus naŭzon vidante "pladon el viva fiŝo". El mia vidpunkto viaj ĉirilataj konsiloj estas malhumanaj, ĉar ili plilongigas la suferojn de mortigataj bestoj. Mi tre ĝojus, se vi aperigus miajn vortojn en la rubriko "Inter Ni".

ULRICH MATTHIAS

(Germanio)

Por konigi al niaj legantoj metodon konservi vivan fiŝon, ni aperigis la artikolon "Kiel Konservivi Vivajn Fiŝojn", kiu neatendite malĝojigis s-ron Ulrich Matthias. Tio estas bedaŭrinda! La artikolo ne signifas, ke ni konsilas kuiron de vivanta fiŝo. Ankaŭ ni kiel s-ro Matthias oponas kontraŭ ĉiaj malhumanaj faroj.


La Red.


ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Mianyang — scienca urbo en okcidenta Ĉinio
- 7 *EKONOMIE:*
Nova imposta sistemo de Ĉinio
- 8 Sismoprognozo por redukti katastrofon
- 10 Media krizo — ĉagreno de la homaro
- 11 Apliki Esperanton en la medicina kampo
- 12 Li vivos por eterne en nia koro
- 14 Blanka tero, verda stelo
- 15 *POR KOMENCANTOJ:*
Ĝentila leporo; La ĉielo ekster puto
- 16 *ESP-NOVAĴOJ*
- 17 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*
Wuhan, ekonomia centro en la landinterno de Ĉinio
- 24 Dazhai hodiaŭ
- 28 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*
Han Yu pri lernado
- 26 *SUR SCENEJO:*
La ŝatata moderna dramo
- 28 *MEM PROVU*
- 29 *BELA ĈINIO:*
Antikvaj portaloj en Anhui
- 32 Novaj vidindaĵoj de la terakota legio de Qin-dinastio
- 36 Nova vivo de la “nacioj sur ĉevalo”
- 38 Tri ĉinaj virinoj
- 40 Zhang Datong, diligenta fizika instruisto
- 42 *ĈINA KULTURO:*
Klasikaj noveloj
- 46 Pri masaĝo
- 47 *POR VIA SANO:*
Masaĝo en la ĉiutaga vivo (I)
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *METIARTAĴOJ:*
Argilaj ludiloj de Yutian
- SUR LA KOVRILO:*
Rikoltado Foto de Liu Sigong
- 2 Abelo sur floro
- 18 La Ĉina Meteorologia Centro
- 34 La Flora Festo de ji-oj
- 44 Rikoltado de tritiko
- SUR LA DORSKOVRILO:*
Akvofalo

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Mianyang (p. 4)
2. Dazhai (p. 24)
3. Lintong-gubernio (p. 32)
4. Yutian-gubernio (p. 50)
5. Shexian-gubernio (p. 29)





ZHANG WEN:

Mianyang — scienca urbo en okcidenta Ĉinio

KOMENCE de la 60-aj jaroj Mianyang estis malgranda urbo en Sichuan-provinco, okcidenta Ĉinio, tamen en la okuloj de multaj ĉinoj, en ĝi estis io sekreta, kaj ĝi estis atentata de la publiko.

Forpasis 30 jaroj. Kaj hodiaŭ, kiam la tiea elektronika industrio mirakle disvolviĝas kaj tie formiĝis la plej granda industria bazo de Ĉinio por televidiloj, komunaj antenoj, pecoj de aparatoj kaj medicinaj aparatoj de ultrasono B, ĝi fariĝis scienca urbo kaj oni ekkonas ĝian veran fizionomion.

SEKRETOJ DE MIANYANG

En la 50-aj kaj 60-aj jaroj multaj sciencistoj kaj teknikistoj venis al Mianyang el diversaj lokoj de Ĉinio por konstrui tie scienc-esploran produktobazon de nacidefenda industrio. Se oni diras, ke tie estas io sekreta, t.e. institutoj kaj arsenaloj en ĝi.

S-ro Yang Jianguo, vicurbestro de Mianyang, sin okupis pri esplorado de lasera fuzio dum 24 jaroj. Antaŭe li laboris en la Inĝeneri-fizika Instituto de Ĉinio, kiu estis granda scienc-esplora bazo de teorio, eksperimento, projektado kaj produktado, kun disvolvado de nacidefendaj altteknikoj kiel la ĉefa tasko. Yang diris al mi, ke la aparta travivaĵo de la urbo faris ĝin mistera kaj urbo kun koncentrataj teknikoj. Tie funkcias pli ol 100 scienc-esploraj institutoj kaj dekoj da militaj entreprenoj, kun 80 000 sciencistoj kaj teknikistoj, kiuj posedas grandan nombron da scienc-esploraj kaj mezuradaj rimedoj kaj scienc-teknikaj fruktoj, unuarangaj en Ĉinio kaj eĉ en la mondo. La Inĝeneri-fizika Instituto de Ĉinio, kiu


transloĝiĝis el montaro antaŭ kelkaj jaroj, estas la plej granda en Azio tiukampe. Ĝi ampleksas 100 fakojn kun 230 branĉoj. Ĝi havas fortan impulsakcelilon, grandpovan laser-aparaton, kantilevran centrifugilon kaj aliajn, sume dek milojn da avangardaj ekipaĵoj. La Ĉina Centro de Esploro kaj Disvolvo de Aerodinamiko, plej granda en Azio, faris la malrapidan, altrapidan kaj ultra-rapidan vent-tunelaron kaj liberan celtabulon de misilo, plej grandajn en Azio, kiuj ebligas al ĝi fari venttunelan eksperimenton al aviadilo, misilo, spacoplano, transporta raketo kaj satelito. Kaj krome, tie funkcias ankaŭ la instituto de magnetaj materialoj kaj maŝinpecoj, unika por Ĉinio, kaj instituto ekskluzive pri komputoraj bildoj.

Ja nur post la 80-aj jaroj Mianyang sukcesis ŝanĝi siajn scienc-teknikajn avantaĝojn en industriajn avantaĝojn. En 1988 la Mianyang-a magistrato faris la decidon "prosperigi la urbon per sciencoj kaj teknikoj". Vicurbestro Yang diris: "Kompare kun la ĉemaraj urboj en sudorienta Ĉinio, Mianyang ne havas avantaĝon en geografia situo, informa interŝanĝo, trafiko kaj transporto. Ĝia avantaĝo distingiĝas per scienc-teknikaj fortoj. Mi estas konvinkita, ke sciencoj kaj teknikoj estas la plej grava movforto en la ekonomia disvolviĝo, dum la homrimedoj estas la plej aktiva faktoro."

Samtempe kun realigo de la decido, la nacidefendaj institutoj kaj arsenaloj komencis turni sian atenton al produktado de civilaj varoj, kio akcelis la ekonomian disvolvigon de Mianyang. Dank' al tio, la urbo, kie antaŭe vivis nur pli ol dekmil loĝantoj, fariĝis elektronika industria bazo de Ĉinio kaj mezgranda urbo kun relative forta ekonomia bazo post



Parto de Mianyang



La punkto-velda roboto de tipo Tianfu-1

kelkaj jaroj. Nun en la urbo larĝas stratoj, en vicoj staras domoj, ĉie vidiĝas grandaj aŭtostabuloj. Ĉio ĉi montras la vivecon de la urbo kaj ankaŭ tion, ke ĝi ne plu estas mistera.

TURNIĜO AL CIVILA PRODUKTADO


En Mianyang oni multe parolas pri la Akcia Kompanio de Elektraj Aparatoj Changhong kaj la koloraj televidiloj kun marko Changhong. Antaŭe la kompanio estis Changhong-maŝinfabrika fondita en 1958. Ĝi estis destinita por produkti maŝinportatajn radarojn. Komence de la 80-aj jaroj ĝi ekproduktis televidilojn kaj ĝia jara produktokvanto atingis du milionojn da koloraj televidiloj. La vendokvanto estis la plej granda inter la samspecaj entreprenoj en kvin sinsekvaj jaroj. Pro tio la fabriko fariĝis la plej grava entrepreno de la urbo.

Ja ne estis glata por la arsenaloj la turniĝo al produktado de civilaj varoj, ĉar la tieaj arsenaloj produktis laŭ ŝtata instrukcio kaj iliaj produktaĵoj estis vendataj de la ŝtato sola. Tial post la turniĝo la ŝlosila problemo por la ekzistado kaj disvolviĝo de la entreprenoj estis fabriki facile vendeblajn varojn kaj plene disvolvi siajn avantaĝojn. Tiuflanke Changhong estis feliĉa. Koncerne tiun problemon, ĝia najbaro Fujiang-maŝinfabrika renkontis multajn malfacilojn. Ĝi estis fabriko de sekundaraj radaroj. Post la turniĝo ĝi sin okupis unue pri produktado de radioriceviloj, opiniante, ke la arsenalo estas absolute avantaĝa tiukampe, sed tute ekster ĝia atendo, la produktitaj radioriceviloj tre malfacile vendiĝis kaj amasiĝis en la tenejo, ĉar tiam integra-cirkvitaj radioriceviloj plene okupis la merkaton anstataŭ la

elektrontubaj produktitaj de ĝi. Post tio la fabriko prove produktis lavmaŝinojn, fridujojn k.a. Ankaŭ ili ne trovis merkaton. Ĝia vicĉefingenero s-ro He Dece diris al mi, ke post foj-refoja enketado fine la fabriko decidis produkti komunajn antenojn, kies frekvenco proksimiĝis al tiu de komunaj antenoj produktitaj en Fujiang. Pli grave estis, ke ili rimarkis, ke rapide disvolviĝas la ĉina televido, kaj ĝuste antaŭvidis, ke komunaj antenoj certe havos grandan debiton.

La alta kvalito de produktaĵoj kaj elasta taktiko por konkurenco garantias la disvolviĝon de la Mianyang-aj entreprenoj. Kvankam la kompanio Changhong kapablis liveri siajn tradiciajn produktaĵojn, tamen ĝi per pruntita mono enkondukis avangardan produktan linion de koloraj televidiloj, kio ebligis al ili produkti pli altgradajn varojn. Siatempo kuŝaj televidiloj de 18 koloroj havis grandan debiton, tamen la kompanio fabrikis starajn televidilojn tele-regatajn. Kaj kiam facile vendiĝis la teleregataj, ĝi komencis fabriki grandekranan kaj tre klaran 29-colan koloran televidilon.

Ingoj de elektraj aparatoj produktitaj de la Fabriko de Radioriceviloj Huafeng estas vaste uzataj. S-ro Fang Benli, ĉefingenero de la fabriko, diris, ke fabrikante civilajn varojn, oni devas neniom malstreĉi sian atenton al la kvalito de siaj produktaĵoj. Kompreneble, la arsenaloj devas esti kapablaj trovi por si merkaton. S-ro Fang diris al mi, ke antaŭ kelkaj jaroj li veturis al Pekino kaj rekomendis siajn produktaĵojn al iu aŭtomobila fabriko, sed la fabriko traktis Fang indiferece kaj li devis longe stari ĉe la enirejo de la fabriko por atendi ŝancon. Nun 30% de la ĉinaj fabrikoj de personaŭtoj uzas la produktaĵojn de Hua-



La produktolinio de koloraj televidiloj de la kompanio Changhong

feng.

SINDONEMAJ SCIENCISTOJ

Oni diris, ke sur la stratoj de Mianyang sesono de la pasantoj estas sciencistoj kaj teknikistoj. Pro tio mi ne povas ne mencii la tieajn sciencistojn.

S-ro Sun Daku estas fakulo de magnetaj materialoj. Antaŭ pli ol 30 jaroj li venis al Mianyang por studi pri la leĝo de proporciiga arango de materialoj. Tiam li loĝis en adoba kabano kaj por aĉeti legomojn li devis iri montvojon de 20 km. Li laboregis en sia laboratorio kaj finfine sukcesis.

Zhang Hanxin estas fama aerodinamikisto. En la pasintaj 20 jaroj li verkis entute 40 disertaciojn. Por verkado li neniam rigardis filmon.

S-ro Feng Dashi, agronomo de tritika kulturado, ricevis plurajn telegramojn antaŭ kelkaj jaroj. La telegramoj urĝis lin veturi hejmen, ĉar lia filo mortis. Reveninte, li diris nenion kaj nur observis la de li kulturatan tritikon kun plena atento kaj zorgeme faris polenadon. Jen naskiĝis la novspeca tritiko, kiu alportis al la ŝtato kvar miliardojn da juanoj da profito.

En 1993 la urbo asignis 200 milionojn da juanoj por scienc-teknika ekspluato kaj de post 1988 la urbo ekspluatis pli ol 200 novajn specojn da elektronikaj produktoj.

En la Instituto pri Aŭtomatigo en Sudokcidenta Ĉinio ĉefingeniero Yang diris al mi, ke en 1992 kaj 1993 la instituto finis 179 scienc-esplorajn projektojn kaj iuj el ili nun jam estas en fabrikado. Inter ili estas ciferegataj sistemoj por maŝin-prilaborado, reg-sistemo de persona komputoro por administrado de elektrejo kaj nereakta transsensilo por kurenta ekzameno. Kaj krome, ili plenumis ankaŭ la taskon fari punkto-veldan roboton, la unuan en Ĉinio, kaj ekspluaton de serio da softvaroj de informa administrado.

SUR NOVA ŜTUPO

La Ekspluata Distrikto de Novaj Teknikoj de Mianyang naskiĝis en 1992. Ĝia naskiĝo markis, ke la scienca urbo suriris novan ŝtupon en sia disvolviĝo.

La distrikto situas en la okcidenta parto de la urbo. Ĝi kovras 6.1 kvadratajn kilometrojn. Nun la bazaj instalaĵoj de la unua periodo kun 2.5 kvadrataj kilometroj jam havas sian rudimenton. Tie pli ol 100 projektoj jam komencis produktadon.

S-ro Lin Xin, oficisto de la ekspluata administracio, konigis al mi, ke por krei bonan medion al investantoj, oni jam konstruis ŝoseojn 18.95 km longajn kaj 15-50 metrojn larĝajn. Oni instalas akvoduktojn, elektrajn dratojn, pluvo-ellasajn tubojn, gastubojn, tubojn por forigi malpuraĵojn kaj retojn de poŝtkomunikado, drata televido kaj komputoroj. Sur antaŭaj kampoj nun staras vicoj post vicoj da altaj domoj kaj la antaŭaj padoj estas anstataŭitaj de larĝaj ŝoseoj.

Ekde sia naskiĝo la ekspluata distrikto rigardis enkondukadon de novaj teknikoj la plej grava. Ĝis aprilo 1994, 590 entreprenoj petis funkcii en la distrikto, kaj 239 el ili estis aprobitaj. Inter ili 123 estas industriaj kaj 27 destinitaj por ekspluati novajn teknikojn. La ole-kemiindustria entrepreno Baishitai, al kiu oni investis 120 milionojn da juanoj, plene utiligos la lokajn riĉfontojn kaj militindustriajn teknikojn por ekspluati erukan acidon, glicerinon, adipan acidon kaj aliajn kemiaĵojn. Gaoda-kompanio de Mezur-regaj Aparatoj inventis memregan instrumenton de paperpasta denseco, kiu plenigis la blankon de ĉinaj paperindustriaj ekipaĵoj. Changhong-kompanio inventis grandekranajn kaj tre klarajn televidilojn kaj ricivilojn de satelita televido, kiuj estas la plej avangardaj produktaĵoj en la ĉina merkato.

La plano de la ekspluata distrikto prezentas belan perspektivon de la scienca urbo Mianyang. ■

Nova imposta sistemo de Ĉinio

de LI NING

FINE de 1993, la ĉina registaro publikigis sinsekvon da leĝoj de impostoj valor-kreska, konsumata, negoca, laŭenspeza de entrepreno, riĉfonta kaj valor-kreska de tero. Tio markis, ke la imposta sistemo de Ĉinio estas en la stadio de normigo.

La supre menciitaj 6 leĝoj kaj reviziita Leĝo de Laŭenspeza Imposto de Individuo definitive validiĝis la 1-an de januaro ĉi-jare. La reformado de la imposta sistemo signifas strukturan reguligon de imposta sistemo en ĝia tuteco kun celo starigi novan impostan sistemon konforman al la nacia stato de Ĉinio kaj la internacia konvencio, plenumantan la bezonon de merkata ekonomio kaj utilan al makroreguligo kaj ekonomia disvolvigo.

La reformado de imposta sistemo enhavas la jenon:

A. Unuigi laŭenspezan imposton de individuo. Generale, por ĉiuj landoj la leĝo de laŭenspeza imposto de individuo baziĝas sur la principo reguligi la enspezan diferencon inter personoj kaj mildigi la kontraŭdiron de granda diferenco en la socia distribuado. Konforme al la aktuala situacio de Ĉinio, la reviziita Leĝo de Laŭenspeza Imposto de Individuo karakteriziĝas per la principo multe imposti al tiuj, kiuj multe enspezas, kaj imposti malmulte al tiuj, kiuj enspezas je meza nivelo kaj al la malalte enspezantaj la ŝtato tute ne impostas. Laŭenspeza imposto komenciĝas ĉe la monata salajro de 800 juanoj, nome, kiu ĉiumonate enspezas pli ol 800 juanojn, tiu devas pagi 5-45% de la superparto kiel imposton.

Por normigi impostan sistemon la antaŭaj laŭenspeza imposto de persono, reguliga imposto de persona enspezo kaj laŭenspeza imposto de industriaj kaj komercaj individuoj en la kamparo kaj urboj estas kunigitaj en novan laŭenspezan imposton de persono. Kaj la nova sistemo estas observenda por enlandaj civitanoj kaj alilandanoj, kiuj enspezas en Ĉinio.

B. Reformi la sistemon de laŭenspeza imposto de entrepreno por unuigi tiujn de la ĉinaj entreprenoj. Ne plu validas la malsamaj tarifoj kaj kategorioj de impostoj por entreprenoj kun diferencaj posedsistemoj, sed anstataŭe, estas uzata tarifo de 33% por la laŭenspeza imposto de ĉiuj entreprenoj investitaj de Ĉinio, kio utilas al identigo de la laŭenspezaj impostoj de entreprenoj investitaj de Ĉinio kaj tiuj investitaj de alilandanoj.

C. Reformi cirkulan imposton, kiu estas la ĉefa fonto de la imposta enspezo de Ĉinio. Antaŭe la cirkula imposto konsistis el impostoj valor-kreska, konsumata kaj negoca, kun malsamaj tarifoj de 3-60%. La reformita cirkula impostaro konsistas el impostoj valor-kreska, konsumata kaj negoca kaj apartenas al duobla reguligo de impostoj ordinara kaj aparta.

1. Meti valor-kreskan imposton sur produktadon, pogranda vendadon, podetalan vendadon kaj importadon de varoj. Tio estas "neŭtra" imposto internacie agnoskita kaj facile travidebla. Komence de la 80-aj jaroj Ĉinio enkondukis la sistemon de valor-kreska imposto kaj metis ĝin nur sur iujn industriajn produktaĵojn, kun multaj tarifoj kaj komplikaj kalkuloj komplika. La ĉi-foja reformado

faris la valor-kreskan imposton plej grava imposto kaj multe simpligis la tarifojn. Oni difinis, ke la fundamenta tarifo estas 17% kaj malalta tarifo — 13% ĉe la unua grado.

2. Imposti iujn konsumataĵojn, kiaj cigaredoj, vinoj, kosmetikaĵoj, valoraj juveloj, benzino, dizeloleo, personaŭtoj, motorcikloj, pneŭmatikoj k.a.

3. Imposti la labornegocon kaj terciaran industrion, de kiuj oni ne postulas valor-kreskan imposton. Ĉi-kampe la impostataj entreprenoj estas tiuj de trafiko, transportado, konstrua muntado, financa asekuro, poŝto kaj telekomunikado, kultura distrado k.a.

Krom la supre diritaj, estas ankaŭ aliaj novaj kategorioj de imposto: valor-kreska imposto de tero, borsa imposto, imposto de heredaĵoj kaj tiu de socia asekuro. Samtempe kun tio, la ŝtato ekspaniigis la amplekson de imposto de riĉfonto kaj nuligis negocimposton de foiro, monpremian imposton, imposton de salajra reguligo. Rezulte de tio, la nombro de industriaj kaj komercaj impostoj de Ĉinio malkreskis de 32 al 20 kaj multe simpligis la imposta sistemo.

Kiel multaj aliaj landoj, ankaŭ Ĉinio praktikas la sistemon de imposto-divido. Tio signifas, ke Ĉinio jam neis la respondecon de financoj faritan en la pasinteco. Surbaze de la rajtoj de la centra kaj lokaj registaroj, Ĉinio pli racie difinos la amplekson de en- kaj elspezoj de diversnivela financa departementoj por pliigi la enspezon de la centra registaro kaj intensigi ties makroreguligadon. ■



La aŭtoro

YIN XIANGCHU*:

Sismoprognozo por redukti katastrofon

SISMO estas natura katastrofo ekstreme terura. La grandaj sismoj en San-Francisko kaj en Tokio, okazintaj en 1906 kaj 1923 respektive, preskaŭ ebenigis la du urbojn. Tangshan estas grava industria urbo de norda Ĉinio konstruita en cent jaroj, kaj la granda sismo en 1976 ruinigis ĝin en palpebruma daŭro.

La perdo kaŭzita de sismo sinkronas kun disvolviĝo de ekonomio. Ekz., la sismo en San-Francisko estis 8.3a-grada kaj la ekonomia perdo atingis 500 milionojn da usonaj dolaroj, sed la sismo en Los-Anĝeleso en la komenco de 1994, estis nur 6.6a-grada kaj la ekonomia perdo atingis 20 miliardojn da usonaj dolaroj.

Pro neatenditeco sismo facile kaŭzas timegon ĉe publiko kaj malstabiligas la socion. Laŭ raporto, en iu loko okazis malgranda sismo (3.0a-grada), kiu ne kaŭzis rektan detruadon, tamen multaj fuĝis de la loko, kio kaŭzis nemalgrandan ekonomian perdon. Nuntempe ekonomio rapide progresas, tial fariĝas pli grave plifortigi sismoprognozon kaj redukti la katastrofon kaŭzitan de sismo.

El tio videblas, ke sismoprognozo estas komuna deziro de la homaro. Sed sismo, kiel natura fenomeno, havas sian apartecon kaj estas ege malfacile prognozi

ĝin. Unue, sismo okazas de kelke da km ĝis kelkcent km sub la tersurfaco. Ĝis nun oni ankoraŭ ne povas fari rektan observon al la hipocentro. Due, por iuj lokoj granda sismo okazas post centoj da kaj eĉ miloj da jaroj. En la plej evoluintaj landoj oni komencis mezuri sisman parametron per aparato antaŭ dekoj da jaroj, ke estas malfacile akumuli kompletajn materialojn tiurilate. Multaj landoj asignis grandan sumon da mono por konstrui eksperimentejon de sismoprognozo, kie oni laboris jarojn kaj eĉ dekojn da jaroj, tamen tie ne okazis granda sismo kaj la laborefiko ne estis granda.

Ĉinio estas lando, kie ofte okazas sismo kun alta frekvenco, forta intenso kaj granda dispozicio.

Ĉi-jarcente, en Ĉinio 570 000 homoj mortis de sismo, kaj ili konsistigis trionon de tiuj, kiuj mortis de diversaj naturaj katastrofoj en la mondo. Sismaj katastrofoj okupas la unuan lokon inter la diversaj naturaj katastrofoj en Ĉinio. La ĉina registaro ĉiam atentis pri sismoprognozo kaj enlistigis ĝin en la programon pri la estonteco de sciencoj kaj teknikoj. Aŭguste de 1971, fondiĝis la Ŝtata Sismologia Buroo de Ĉinio, kiu gvidas la sismoprognozon de la tuta lando. En 1966-1976 en Ĉinio multfoje okazis granda sismo, kio donis valorajn materialojn por sismoprognozo. Post 1976 Ĉinio paŝis en pacienca periodon de sismo. Profitante la ŝancon, la Ŝtata Sismologia Buroo de Ĉinio efektivigis gravajn sistemajn projektojn de sismoprognozo. Unue,

pli ol 2 000 sciencistoj kaj teknikistoj sisteme reordigis la akiritajn materialojn, metodojn kaj laborfruktojn en tri jaroj; due, surbaze de la supre menciita laboro, oni listigis datenojn de ĉiuj sismoprognozaj metodoj kaj formigis speciala kalkulordo. Dank' al tio, la sismoprognozo de Ĉinio atingis avangardan nivelon de la mondo.

Sub tia cirkonstancaro, meze de la 80-aj jaroj mi malkovris novan teorion de sismoprognozo, respond-proporcian teorion de ŝarĝo kaj malŝarĝo. Helpe de miaj kolegoj, la teorio rapide progresis en la 90-aj jaroj.

La respond-proporcia teorio de ŝarĝo kaj malŝarĝo iom post iom formiĝis, dank' al tio, ke ni longtempe esploris pri la hipocentra fiziko, asimilante la plej novajn sciencajn fruktojn en la mondo (nelinia scienco, sistema scienco ktp) kaj ĉerpante abundajn sismoprognozajn spertojn de Ĉinio. La formiĝo de sismo estas tre kompleksa, tamen la ĉefa fizikesenco estas, ke la periloj en la hipocentro iom post iom difektigas, kio finfine kaŭzas subitan perdiĝon de stabileco (detruo). Tio estas procedo de ŝanĝiĝo de kvanto al tiu de kvalito. En la sismo-neformiĝanta periodo aŭ en la komenco de la sismoformiĝanta periodo la sismoformiĝanta regiono estas en stabila stato. Sub tia kondiĉo, se la ricevita forto iomete grandiĝas (nome "ŝarĝo" en mekaniko), ankaŭ la respondaj fizikaj kvantoj (ekz., transformiĝo, moviĝo, energia denseco ktp., nome "respon-

do”) samkvante grandigas; male, la ricevita forto iomete malgrandigas (nome “malŝarĝo” en mek-aniko), ankaŭ la “respondo” samkvante malgrandigas. Sed antaŭ ol sismo okazos, nome kiam estos ŝanĝiĝo de kvanto al tiu de kvalito, eĉ tre malgranda ŝarĝo povos kaŭzi grandegan “respon- don”. Tiel per la proporcio de ŝar- ĝa kaj malŝarĝa respondoj oni po- vas determine certigi la procedon de sismo-formiĝo. La teorio ne nur konformas al la moderna sis- tema scienco, sed ankaŭ devenas de la antikva filozofio de la Ori- ento kaj Okcidento. Tion oni po- vas sperti en la ĉiutaga vivo. Ekz., proverbo diras: “Unu peco da paj- lo sufiĉas por premfaligi plenŝar- ĝitan kamelon.” Tio vivece eks- plikas la teorion. Por la giganta kamelo, kiu povas porti sur si gar- bojn da pajlo, unu peco da pajlo por ĝi estas nenio! Sed, se oni senĉese ŝarĝos ĝin, la kamelo iom post iom sentos la ŝarĝon pliigan- ta. Finfine, eĉ unu peco da pajlo povas faligi ĝin.

Tio signifas, ke observi la res- pondon de iu sistemo al malgran- da interfero (ŝarĝo kaj malŝarĝo) estas efika metodo juĝi la staton (stabileco) de la sistemo. Jen en tio kuŝas la esenco de la respond- proporcio teorio de ŝarĝo kaj mal-

ŝarĝo. Kiam oni kaptos la fizikan esencon de sismo, oni povos solvi la problemon.

Poste, ni dediĉis kelkajn jarojn por solvi la problemojn, kiel ŝar- ĝi kaj malŝarĝi, kiel kalkuli respond-proporciojn ktp. Surbaze de tiu teorio, ni dediĉis ankoraŭ kelkajn jarojn por fari postkonfir- man prognozon al pli ol 100 sis- moj en- kaj eksterlandaj, inklu- zive de 4a-grada ĝis 8.6a-grada sismoj. En plejparto de ili ni suk- cesis. Kaj plie, ni aplikis la novan metodon en prognozado de sismo. En la pasintaj jaroj ni sukcesis prognozi 4-foje pli-ol-6a-gradajn enlandajn sismojn, kiaj Datong- sismo 6.1a-grada en Shanxi en la 26-a de marto 1991, Pu’er-sismo 6.3a-grada en Yunnan en la 27-a de januaro 1993 kaj la sismo en Los-Anĝeleso en la 17-a de janu- aro 1994.

Komence de la pasinta jaro, doktoro E.A. Bergman de la Sis- mologia Instituto de Usono sendis al ni materialon pri sismo en Ka- lifornio. Per la respond-proporcio teorio ni faris analizon kaj espl- on de tiuj materialoj kaj trovis, ke la ĉirkaŭaĵo de Los-Anĝeleso kaj aliaj du regionoj estas frape anormalaj. La 28-an de oktobro 1993 ni sendis la analizon (laŭ- tempa ŝanĝkurbo de la respond-


proporcio de ŝarĝo kaj malŝarĝo) al doktoro E.A. Bergman kaj atentigis, ke en la venonta jaro en la supre menciitaj regionoj prob- able okazos mezgranda sismo (6-7a-grada). Malpli ol tri mona- tojn post kiam la letero estis sen- dita, en Los-Anĝeleso okazis sis- mo. Usonaj kolegoj tre interesiĝis pri nia esploro. Antaŭ nelonge ili sendis la katalogon de la postsku- o, por ke ni faru esploron. La aliajn du regionojn ni ankoraŭ observas. Ankaŭ sismologiaj or- ganizoj de Gruzio kaj aliaj landoj sendis al ni rilatajn materialojn por nia esplorado.

Jus komenciĝis la esplorado kaj aplikado de la respond- proporcio teorio de ŝarĝo kaj mal- ŝarĝo, tamen nin jam subtenis multaj kolegoj en- kaj eksterlan- daj. Januare de 1994, en Veling- tono okazis la Konferenco de Sis- mologio kaj Geointerna Fiziko, en kiu estis tre bonvenaj niaj di- sertajtoj. Pli ol 20 sismologoj el aliaj landoj petis de ni sendi al ili rilatajn materialojn.

Menciindas, ke por esplori kaj apliki la respond-proporcian teo- rion de ŝarĝo kaj malŝarĝo ne- cesas pluaparte ekspluati multajn kampojn. Ekz., pli ol dek geofizi- kaj parametroj estas uzeblaj kiel “respondo” por kalkuli la respond-proporciojn de ŝarĝo kaj malŝarĝo (sed nun oni uzas nur sismo-energion kiel parametron). Se oni aplikos tiujn parametrojn, oni multe progresos en sismopro- gnozado. Krome, ĉu la bazaj kon- ceptoj de la teorio, ĉu nia prakti- kado en la pasintaj jaroj, ĉio ĉi montras, ke la teorio povas prog- nozi ne nur naturan sismon, sed ankaŭ sismojn akvokonservejan kaj minejan, magmo-ŝprucon, vulkanan erupcion kaj aliajn na- turajn katastrofojn. ■

*Yin Xiangchu, esploristo de la Analiza kaj Prognoza Centro de la Ŝtata Sismologia Buroo de Ĉinio. En la pasintaj jaroj li sin dediĉis por stu- di pri la sisma mekaniko kaj prezen- tis la respond-proporcian teorion de ŝarĝo kaj malŝarĝojn.

S-ro Yin Xiangchu (dekstre) kaj liaj kolegoj



Media krizo — Ĉagreno de la homaro

EN 1992 la ĉefoj de diverslandaj registaroj kunvenis en Hispanio por diskuti pri protektado de la tero minacata de la malboniĝo de la ekologia medio. Grandnombraj materialoj montris, ke sunlumo, aero kaj akvo, gravaj elementoj por la homa vivo, estas pli-malpli damaĝitaj.

Unue, manko de dolĉa akvo fariĝas problemo de la tuta mondo. Dekkvinono de la homoj en la mondo vivas en akva krizo kaj en la jaro 2025 al triono de la homoj en la mondo, nome, al 2.8-3.3 miliardoj da homoj, mankos dolĉa akvo. Pro polucio nur malpli ol 1% de la teraj akvofontoj konformas al la higiena normo kaj pli ol 1.2 miliardoj da homoj trinkas akvon nekonforman al la normo. Ĉiujare pli ol 10 milionoj da homoj mortas pli-malpli pro trinkado de poluciita akvo.

Due, aerpolucio disvastiĝas el urboj kaj fabrikoj al la vasta kamparo kaj eĉ al aliaj landoj. Kvinono de la homoj en la mondo enspiras aeron malutilan al la sano. En iuj urboj la jara averaĝa denseco de polvo estas 5-oble pli granda ol tiu difinita de la Monda Sana Organizo. Acida pluvo, kaŭzita de plimultiĝo de sulfura dioksido en la aero, detruas grandan areon da arbaroj, mortigas fiŝojn en dolĉa akvo kaj neniigas sennombrajn historiajn objektojn.

Trie, la temperaturo de la tero plialtiĝas kaj ultraviolaj radioj plimultiĝas. La pliiĝo de karbona dioksido, metano, azota oksido kaj kloro-fluorido en la atmosfero donas varmdoman efekton kaj tiel restigas pli da varmo sur la tersurfaco. Laŭ antaŭdiro en la jaro 2030 la temperaturo de la tero plialtiĝos je 3-5°C, tiel ke la marsurfaco altiĝos je unu metro kaj triono de la agroj kaj loĝlokoj de miliardo da homoj falos en danĝeron pro tio, ke tempesto atakos la internon de kontinento kaj markvo retrofluos en riverojn. Kloro-fluorido k.a., detruos la ozonan tavolon de la atmosfero kaj malhelpos ĝin ensorbi ultraviolajn radiojn de la suno. La observado en 1993 montris, ke la ozona tavolo perdiĝas je kreskanta rapideco. Super la

Antarkto aperis senozona malpleno granda kiel la teritorio de Usono kaj alta kiel Himalajo. Se pli multe da ultraviolaj radioj atingos la tersurfaco, tio ne nur plimultiĝos suferantojn de haŭta kancero kaj katarakto, sed ankaŭ forprenos la vivon de mikroboj en grundo kaj alĝoj sur surfaco de maro, tiel ke la ŝlosila ero de la ekologia ĉeno estos rompita kaj la vivsistemo de la tero perdos sian ekvilibron.

Laŭ kalkulo de fakuloj, de la mezo de la kuran-ta jarcento en la mondo perdiĝis kvinono de la surfaca grundo de kampoj, kvinono de la tropikaj plugarbaroj kaj dekmiloj da estaĵaj specioj. Nun, ĉiujare en la mondo perdiĝas 24 miliardoj da tunoj da surfaca grundo kaj 17 milionoj da hektaroj da arbaroj, dezertiĝas 6.2 milionoj da hektaroj da kampoj kaj ĉiutage malaperas almenaŭ 140 estaĵaj specioj. Se la tropikaj plugarbaroj perdiĝus post dekoj da jaroj, do ĉirkaŭ duono de la estaĵaj specioj malaperus. Ĉiujare rubkvanto de la mondo atingas dekon da miliardoj da tunoj, triono el ili estas venena. Oni vidis sur fotografajoj senditaj de satelitoj, ke preskaŭ ĉiuj grandaj kaj mezgrandaj urboj de la mondo estas ĉirkaŭitaj de ruboj.

La plej grava faktoro de la media krizo estas rapidega kreskado de la loĝantaro, kaj la ekonomia aktivado de la homa socio kaj intensiĝo de teknika kapablo akcelas la krizon. La homaro estas la ununura reganto de la tero kaj ankaŭ la unua okupanto de ĉiuj ekologiaj sistemoj de la tero. La homaro ne nur konsumas grandan kvanton da naturaj riĉfontoj kaj kondukas multajn estaĵajn speciojn al ekologiaj sistemoj, en kiuj ili neniam vivis, sed ankaŭ ŝutas grandan kvanton da kemiaj substancoj, kreitaj kaj forlasitaj de ili mem, sur la teron kaj en la atmosferon, riverojn, lagojn kaj marojn. La natura medio, kiel tenejo de riĉfontoj kaj ruboj, havas sian limon. Troa ekspluatado certe kondukos al poluciado de la medio.

la media krizo jam endanĝerigas la vivsistemon de la teraj estaĵoj. Sub tiu cirkonstancaro necesas por la homaro ŝanĝi la rilatojn inter si kaj la naturo kaj bone scii, ke la homaro estas nur membro de la naturo, sed ne reganto de ĝi, ke la homaro vivas de la naturaj sistemoj kaj riĉfontoj de la tero kaj ke la homaro ne povas akiri kontinuan ekonomian prosperon sen la prospero de la biosfero de la tero. La voĉoj "Ni havas nur unu teron" kaj "Savu la teron" trovas pli kaj pli da respondantoj. Nemalmultaj registaroj prenas la median protekton kiel sian primaran laboron.

Videblas, ke la homaro nepre devas fari median revolucion en la estontaj jardekoj, efektiviginte la industrian revolucion, kiu daŭris centojn da jaroj.

WANG HANPING:

Apliki Esperanton en la medicina kampo



S-ro Cui Zhiqin prelegas en la 1-a Ĉina Medicina E-Konferenco.

EN aprilo 1994, 82 esperantistoj el 13 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando venis al Zaozhuang, nova industria urbo situanta en suda Shandong-provinco, kie okazis la fondkunveno de la Ĉina Medicina E-Asocio (ĈMEA) kaj la 1-a Ĉina Medicina E-Konferenco.

La fondkunveno kaj la konferenco komenciĝis antaŭtagmeze de la 18-a. S-ro Wang Yongti, profesoro de la Shandong-a Medicina Universitato prezidis en la inaŭguro. Komisie de la prepara komitato de la Ĉina Medicina E-Asocio, s-ro Cui Zhiqin, farmaciisto de la Ŝanhaja Tradicia Ĉinmedicina Hospitalo, faris raporton pri la prepara laboro de la asocio. Li diris, ke jam en 1984 22 ĉinaj medicinaj esperantistoj iniciatis fondon de la Ĉina Medicina E-Sekcio Koresponda. De tiam preskaŭ en ĉiu tutlanda E-kunveno medicinaj esperantistoj okazigis fakan kunsidon por fari akademian interŝanĝon kaj diskuti, kiel progresigi la medicinan E-agadon de Ĉinio. En 1986 oni fondis la preparan komitaton de la Ĉina Medicina E-Societo anstataŭ la Ĉina Medicina E-Sekcio Koresponda (Nun la oficiala nomo de la asocio estas Ĉina Medicina E-Asocio).

Dum la 71-a UK, la prepara komitato de la societo asistis al la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) en organizo de ĝia jarkunveno. Novembre de 1988 fondiĝis la Xinjiang-a filio de la societo. En la sama jaro dufoje eldoniĝis "Ĉina Medicina Esperanto-Krestomatio". Maje de 1990, 16 medicinaj esperantistoj de la tuta lando kunvenis en la urbo Wuhan de Hubei-provinco. En la kunveno ili diskutis kaj aprobis la malneton de la statuto de la societo, kaj naskiĝis la redakcio de la organo "Informilo Medicina". De tiam la ĉinaj medicinaj esperantistoj plivigliĝis. Nun la nombro de la membroj de ĈMEA superas 200 el 26 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando. Ĝis nun ili publikigis 95 disertaĵojn en Medicina Internacia Revuo kaj fondis 11 lokajn medicinajn E-organizaĵojn. En 1988 s-ro Cui Zhiqin akiris premion Shinoda de UMEA.

Poste Gu Jianhua, profesorino de la Jiangxi-a Tradicia Ĉinmedicina Instituto voĉlegis la statuton de ĈMEA.

La inaŭguron ĉeestis ankaŭ oficistoj de la Zaozhuang-a magistrato, kiuj ĉiam multe subtenas E-movadon. Liu Shenxiang, vicurbestro kaj direktoro de la loka komitato de tiu ĉi kunveno, Li Hong'en, profesoro pri ostologio kaj vicprezidanto de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la urbo, Cao Wenxing, prezidanto de la Zaozhuang-a E-Asocio kaj direktoro de la Scienca kaj Teknika Komisiono de la urbo, kaj aliaj faris paroladon en la inaŭguro.

La konferenco ricevis pli ol 30 disertaĵojn. Posttagmeze 12 esperantistoj voĉlegis siajn disertaĵojn en la konferenco. La disertaĵoj estas enhavoriĉaj kaj la atmosfero de la konferenco estis varma. Tio montras, ke Esperanto pli kaj pli diskonigiĝas en la ĉina medicinistaro.

Antaŭtagmeze de la 19-a, la partoprenantoj de la konferenco kune ekskursis en pluveto. Posttagmeze oni aprobis la reviziitan statuton de ĈMEA kaj elektis konsilantaron el 33 membroj en la ferma kunveno, kiun prezidis s-ro Tu Bing, profesoro de la Unua Militmedicina Universitato. Tu Bing estis elektita kiel prezidanto de ĈMEA, Wang Yongti, Cui Zhiqin kaj Peng Jianjun kiel ĝiaj vicprezidantoj, Wei Shulin kiel ĝia ĝenerala sekretario, Cui Guoqing kaj Zheng Bocheng kiel ĝiaj sekretarioj.

La unua konsilantaro de la asocio diskutis pri siaj laboroj. Ĝi decidis, ke la konsilantaro ĉefe plenumos 5 laborojn en la venontaj 4 jaroj: unue, daŭre propagandi kaj apliki Esperanton en medicino, eldoni trimonatan revuon "Ĉina Medicino"; due, plioftigi kontakton kun alilandaj medicinaj E-organizaĵoj kaj akademiajn interŝanĝojn, por kiel eble plej baldaŭ aliĝi al UMEA; trie, fondi komisionon pri instruado por altigi E-nivelon de la membroj; kvare, kompili kaj eldoni "Medicinan Vortaron Esperanto-Ĉinan" kaj "Medicinan kurson de Esperanto"; kvine, plimultiigi membrojn de la asocio kaj fari preparadon por la 2-a Ĉina Medicina E-Konferenco.

Sukcese finiĝis la dutaga kunveno. La fondiĝo de la Ĉina Medicina E-Asocio kaj la okazigo de la 1-a Ĉina Medicina E-Konferenco montras, ke la ĉina medicina E-movado eniris en novan etapon. ■

Li vivos por eterne en nia koro

— Profunda funebro pri s-ro Chu Tunan

S-RO Chu Tunan, prezidanto de la societo Amikoj de Esperanto kaj honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, forpasis en Pekino la 11-an de aprilo 1994, en sia aĝo de 95 jaroj. Li forlasis por ĉiam la ĉinajn esperantistojn, kiuj lin respektis, kaj la Esperantan aferon, al kiu li dediĉis multe da jaroj. La malfeliĉo ege malĝojigis la ĉinajn esperantistojn.

Jam en sia juneco s-ro Chu Tunan sin dediĉis al la progresema kultura kaj eduka afero de Ĉinio kaj batalis por la liberiga afero de la ĉina popolo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio kiel kutime li kontribuis por disvolvi la kulturan kaj edukatan aferon de Ĉinio, intensigi la internacian kulturen interŝanĝon kaj plioftigi la kontaktigon inter la popoloj de diversaj landoj. En sia maljuneco li servis kiel vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj honora prezidanto de la Centra Komitato de la Ĉina Demokrata Ligo. Li estis prestiĝa socia aktivulo.

S-ro Chu Tunan eksciis Esperanton en la komenco de la kuranta jarcento. En 1919, post ekzameno li eklernis en la Pekina Supera Normala Lernejo. Tiam, la ĉina E-movado furoris, iniciatite de Cai Yuanpei, Lusin kaj aliaj famaj pensuloj, literaturistoj kaj edukistoj. Lin tre interesis la bela idealo de Zamenhof kaj scienceco de Esperanto. Li do komencis memlerni E-on en postlecionaj horoj kaj povis legi facilajn Esperantaĵojn. Poste, pro revolucia agado kaj maltrankvila vivo, li ĉesigis sian lerna-



S-ro Chu Tunan (maldekstre) kaj la aŭtoro

don de la lingvo. Tamen li ĉiam zorgis pri la ĉina E-movado. Antaŭ dek jaroj en sia artikolo "Retrospektive kaj perspektive al la ĉina E-movado" li rememoris la pasintajn. Li diris, ke en la naciliberiga batalo de la ĉina popolo la verda standardo de Esperanto unuigis kontraŭfaŝismajn batalantojn ĉinajn kaj alilandajn. Granda nombro da e-istoj kun Hujucz, Ĵelezo kaj aliaj kiel reprezentantoj per E-o faris grandan penadon por la nacia sendependeco kaj liberigo de Ĉinio kaj rekomendado de literaturaj verkoj de la subpremataj nacioj, iuj el ili eĉ oferis sian vivon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio e-istoj de la malnova kaj nova generacioj kune iniciatis la revuon "El Popola Ĉinio", funkciigis E-an elsendon, eldonis multe da E-aj libroj pri Ĉinio kaj ĝiaj literaturo kaj arto kaj aktive partoprenis in-

ternaciajn E-aktivadojn. Ĉio ĉi montris, ke la ĉinaj e-istoj ludis bonan rolon en la kontaktigo inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Foje, s-ro Chu Tunan diris: "Mi estas por ĉiam fidela al E-o." Li eksplikis, ke la ĉiam disvolviĝantaj sciencoj kaj teknikoj mallongigas la spacon kaj tempon de la mondo kaj pli kaj pli oftigas la kontaktigon inter la homoj. Sed en la nuna mondo estas ankoraŭ parolataj pli ol 2 000 lingvoj, kio ege malhelpas la progreson de la homaro. Tial necesas por ni universala lingvo, kiu ne havas historian antaŭjuĝon nek rasan diskriminacion, sed estas scienca, facile lernebla kaj belsona. La centjara praktikado konvinkis, ke E-o ja estas tia lingvo.

Inspirate de tiu ideo, s-ro Chu Tunan konstante subtenis propagandon kaj disvastigon de E-o dum



S-ro Chu Tunan en la Tria Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto

la tuta vivo. Li publikigis multe da artikoloj, paroloj kaj surskriboj pri E-o kaj prezentis prudentajn proponojn. Kiel li ripetfoje emfazis, se E-o servos kiel lingvo komuna por la homaro, do ĝi multe faciligos ĉiutagan vivon kaj internacian kontaktigon inter diverslandaj popoloj, kiuj scipovos nur sian nacian lingvon kaj E-on. Kaj krome, UN, diverslandaj registaroj kaj iliaj popoloj ne plu elspozos multan monon, tempon kaj energion tiuflanke. Tiam nur per E-o oni povos studi eminentajn kulturojn de aliaj nacioj kaj posedi plej avangardajn sciencojn kaj teknikojn. Pro tio li plurfoje laŭdis, ke Unesco certigis la valoron de E-o por la homaro kaj aprobis koncernan rezolucion kaj esperis, ke ĝi ludos pli grandan rolon en disvastigo de E-o.

S-ro Chu Tunan skribis en sia artikolo: "Mi firme kredas, ke kun la progreso kaj evoluo de la homa socio, la homaro nepre forigos ĉiujn nebulajn pensojn kaj antaŭjuĝojn, kaj fine realiĝos la komuna idealo de la homaro, ke oni iom post iom parolos komunan lingvon kaj konstruos harmonian socion sen ekspluatado kaj subpremado de homoj per homoj." Ĉiufoje, kiam li intervidiĝis kun e-istoj de la Pekina E-Asocio, li diris, ke ili, ŝarĝitaj per la peza tasko, iru ankoraŭ pli longan vojon, kaj ke la bela

idealo de Zamenhof realiĝos per strebado de generacioj.

Por bone plenumi sian devon de la malnova generacio, s-ro Chu Tunan ĉiam subtenis la E-an aferon tutforte, malgraŭ siaj granda aĝo kaj okupiteco, kio emociis ĉiujn e-istojn. Li estis alte respektata.

Li kune kun Hujucz, Bakin kaj aliaj eminentuloj iniciatis la societaton Amikoj de Esperanto por unuigi eminentulojn de diversaj rondoj kaj subteni la E-movadon. Kiel prezidanto de la societo, li plurfoje prezidis kunvenon por diskuti pri ĝia laboro.

Li ofte donis varman parolon en E-a kunveno, akceptis diverslokajn e-istojn kaj kune kun ili diskutis por solvi problemojn en la E-movado.

Li estis fama kaligrafo de Ĉinio. Liaj kaligrafajoj karakteriziĝas per forteco kaj ĉarmeco kaj estas valoraj por la amantoj de kaligrafajoj. S-ro Chu Tunan skribis por esperantistaj rondoj pli ol 20 titolojn de revuoj, libroj kaj donacis al ili multajn kaligrafiajn. Tiuj kaligrafiaj estas plenaj de lia amo al E-o kaj servas kiel bonegaj materialoj por disvastigi E-on.

En la pasintaj 15 jaroj s-ro Chu Tunan fervore subtenis la laboron de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio. Li ofte aŭskultis ilian raporton pri laboro en sia hejmo kaj helpis ilin ŝolvi malfacilojn en laboro. Li intervidiĝis kun s-ro Yoshimi Umeda kaj d-ino Flóra Szabó-Felső, eksaj estraranoj de UEA, kaj s-ro Simo Milojevič, ĝenerala direktoro de UEA, kaj diskutis kun ili pri la monda E-movado, okazigo de la 71-a Universala Kongreso de E-o en Pekino k.a. Li ĝoje konsentis funkcii kiel vicprezidanto de la Patrona Komitato de la 71-a UK kaj kontribuis por sukcesigi la kongreson.

Li ĉiam zorgis pri la revuo EPC kaj la E-a elsendo de Radio Pekino kaj multfoje vizitis iliajn ekspoziciojn. Li alte taksis iliajn kontribuojn por konigi Ĉinion, akceli la

kulturan interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj plifortigi la amikecon kaj interkomprenigon inter diverslandaj popoloj.

Li tutforte subtenis la disvastigon de E-o inter la scienc-teknikaj rondoj far la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (STEA sub ĈAS), kaj ankaŭ ĝian eldonadon de la revuo Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj. En intervjuo kun reprezentantoj de STEA sub ĈAS, li ekzemplis sian sperton, dirante, ke li renkontis multe da lingvaj baroj en vizito al aliaj landoj kaj profunde sentis la bezonon de komuna lingvo por la homaro, kaj kuraĝigis sciencistojn kaj teknikistojn diligente lerni kaj apliki E-on. Li diris: "En la Ĉina Akademio de Sciencoj laboras multaj famaj sciencistoj, kiuj faris grandan kontribuon en sia fako. Se ili subtenos la disvastigon de E-o inter la scienc-teknikaj rondoj, ankaŭ tio estos granda kontribuo en la kultura historio de la homaro." Pro tio li akceptis la inviton funkcii kiel konsilanto de STEA sub ĈAS kaj multfoje intervidiĝis kun ĝiaj laborantoj. Eĉ malsana, li ankoraŭ zorgis pri la afero, por kiu ili laboras.

Januare de la kuranta jaro, t.e., duonjaron post sia enhospitaliĝo, s-ro Chu Tunan ricevis leteron de STEA sub ĈAS. En sia respondo li skribis: "Mi ricevis vian leteron datitan je la 5-a de januaro kaj informiĝis, ke vi okazigos la 4-an Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en E-o la 10-an de julio. Sub la cirkonstancaro de reformado kaj por-domalfermo vi certe faros kontribuon por akceli la disvolviĝon de E-o kaj la scienc-teknika afero kaj kreos novan situacion." Tion diris s-ro Chu Tunan du monatojn antaŭ sia forpaso.

S-ro Chu Tunan forlasis nin kaj ni perdis estimatan antaŭulon kaj samideanon, tamen lia nomo estos enskribita por eterne en la E-an historion kaj lia spirito por ĉiam kuraĝigos nin antaŭen. ■



La aŭtoro (la kvara de maldekstre) kaj kanadaj esperantistoj sur sketejo de Otavo. Dekstre estas s-ro Normand Fleury.

CUI JIANHUA:

Blanka tero, verda stelo

JE la 14-a de decembro 1992 mi veturis al Kanado por unujara studado pri kebekia literaturo. Tio ja estis mia unua vojaĝo ekster Ĉinio kaj mi estis maltrankvila. Kanado estas fora kaj nekonata lando por mi. Ĉu mi povos kompreni kanadanojn? Tamen min iom trankviligis la jarlibro de UEA en mia poŝo, laŭ kiu mi povus trovi esperantistamikojn.

Sekvanttagon de mia alveno en Montrealo, mi hazarde telefonis laŭ jarlibro al s-ro Normand Fleury. Lia edzino Zdravka Metz respondis al mi. "Saluton! Mi estas ĉina esperantistino. Mi alvenis por studi kebekian li-

teraturon en Montrealo. Nun mi ankoraŭ ne trovas loĝejon. Ĉu vi povus helpi min trovi ĝin?" mi demandis.

"Ne estas problemo. Vi povas alveni kaj loĝi ĉe ni. Morgaŭ mi helpos vin transporti viajn pakojn per mia aŭto," tuj ŝi entuziasme respondis.

Kiam mi ekloĝis ĉe ŝi, mi sciis, ke s-ro Normand Fleury estas prezidanto de Kebekia Esperanto-Asocio. Lia domo estas centro de loka Esperantomovado kaj Esperanta libroservo.

Tiu familio estas vera Esperanta familio. Zdravka venis de Kroatio kaj interkonatiĝis kun sia edzo en UK. Iliaj infanoj,

dekjara Damir kaj sepjara Mira, denaske parolas en Esperanto. Dum kvin monatoj de mia loĝado ĉe ili Esperanto estis nia ĉiutaga lingvo. En la dua semajno post mia alveno, televida centro de Kanado alvenis por filmi Montrealan Esperantan Klubon. Tiam mi iom prezentis ĉinajn Esperantajn librojn kaj Esperantomovadon kaj E-instruadon. Oni dissendis plurfoje tiun programon en kanada televido.

Al Montreala Esperanto-Asocio apartenas preskaŭ centoj da esperantistoj, kiuj kunvenas regule, unufoje monate. Sed ofte estas renkontiĝo, ekzemple, kiam alvenas eksterlandaj esperantistoj. Kelkfoje ĉe semajnofino oni veturas al bela monto aŭ pitoreska lago por tie kunmanĝi kaj kunloĝi. Mi ĉeestis tiajn aktivadojn plurfoje kaj ĉinaj manĝaĵoj faritaj de mi multe plaĉis al ili.

La 19-a de februaro 1993 estis sunbrila tago. Mi kaj 12 montrealaj esperantistoj venis al Otavo por ĉeesti semajnofinan esperantistan renkontiĝon.

Otavo estis al mi pli mistera ol Montrealo. Ĉar antaŭe mi neniam surmetis la piedojn sur la lokon, kie la popolanoj parolas lingvon, kiun mi ne komprenas nek parolas. Vespere, kiam ekaŭdiĝis japana tamburmuziko, mia timo jam forkuris. Sed la hundiĝo Bejla ektimis. Ŝi glite forkuris eksteren kaj poste scivoleme enŝovis sian kapon por rigardi, kio efektive okazis al tiuj gajaj homoj.

Por ĝui bonan restadon en iu urbo, la plej grava afero estas trovi loĝejon. Sed ĉe la otava renkontiĝo, neniu bezonis maltrankviligi pro tio. Post la vesperprogramoj, ĉiuj facile trovis siajn gastigantojn. Mi havis grandan honoron tranokti kun Marta, hungara esperantistino, en la bela loĝejo de Suzana. En tiu domo ni dancis frumatene kaj faris sandviĉon profundnokte. Mi ĝuis kun granda intereso la artaĵojn fari-

tajn de Suzana. En dimanĉo, akompanate de Suzana, mi vizitis la Nacian Artan Muzeon.

Sabaton ni iris sketi ĉe la kanalo Rideau. Tie mi unuafoje propraokule vidis kiel junaj kaj maljunaj gesketantoj lerte, rapide kaj bele glitis. Kuraĝigita de esperantistoj, mi decidis provi. Mi surmetis sketsuojn kaj mallerte iris al la sketejo, subapogate dekstre de Zdravka kaj maldekstre de Jean Klaudo. Ho! Dio mia! Kial la piedoj ne obeis min? Mi falis, la koksoj doloris kaj mi baldaŭ finis la provadon. Sed mi ne forgesis fotiĝi por fanfaroni post reveno al Ĉinio.

Vespere, en la domo de Rikardo Piper Hull, antaŭ la flamanta kameno, en varma etoso, la esperantistoj ĝojplene interparolis kaj gustumis diversspecajn manĝaĵojn portitajn de fervoraj otavaj esperantistoj. Post mia prelego pri Ĉinio, la entuziasma aplaŭdo montris, ke mi estis bone komprenita.

Nun, kvin monatojn vivinte en la Esp-familio, mi rajtas diri, ke mi pli ŝatas Esperanton ol la francan, ne pro facileco de la internacia lingvo, sed pro esperantismo.


En Montrealo mi renkontis homojn el diversaj landoj kaj laŭ mi Esperanto estas genia elpensado por monda komunikado. Ĝi vere valoras kaj ludas rolon de neŭtrala lingvo. Mi vere ne sentas, ke mi parolas ies lingvon, ĉar ĝi estas lingvo de neniua nacio kaj samtempe de ĉiuj. Mi sentas min egalrajta eĉ se mi ne bone parolas ĝin.

Kanado estas malvarma lando. En vintro, neĝo kaj frostado daŭris kaj daŭradis, sed mi sentis la varman koron, fervoron kaj afablecon de esperantistoj.

Por ĉiam mi memoros la entuziasmajn gastamajn esperantistojn en Kanado. ■

POR KOMENCANTOJ

Ĝentila leporo



ESTIS ĝentila leporo, kiu kondukis ĉiam modeste kaj singardeme.

Foje ĝi renkontis vulpon kaj ektimis. Kion fari? Forkuri! Ĝi rapide forkuris kaj venis al kaverno, sed ĝi ne sciis, ke en la kaverno ĝin atendis granda serpento, pli danĝera malamikino.

La leporo sciis, ke oni ne rajtas eniri en fremdan loĝejon sen permeso de ĝia mastro.

Do, la leporo ĝentile demandis, kalkansidante: “Saluton, mia kara mastro, ĉu mi povas eniri?” Aŭdinte la voĉon de leporo, la serpento ege ĝojis, ĉar ĝi tre ŝatas leporojn.

“Tuj eniru! Tuj!” respondis la serpento, pensante, ke ĉi-foje la leporo falos en ĝian kaptilon. Sed la leporo tuj rekonis ĝian voĉon.

“Pardonu, ke mi ĝenis vin,” diris la leporo. “Mia patrino atendas min hejme. Ĝis revido!” Je tio ĝi tuj forkuris kaj malaperis el la vido.

Reveninte en sian propran kavernon, la leporo konkludis, ke la ĝentileco estas utila por ĉiuj.

La ĉielo ekster putro

IUTAGE rano, kiu rigardas la ĉielon sur la fundo de putro, saltis eksteren kaj trovis la ĉielon senlima. Ĝi promenis al la najbara arbaro, ĝoje kantante.

La rano renkontis leporon en la arbaro kaj ĝoje diris: “Kara leporo, mi volas amikiĝi kun vi!” La leporo diris: “Bone, sed mi devas ekzameni vin. Ĉu vi scias, kiom granda estas la ĉielo?” La rano saltante respondis: “Mi scias. La ĉielo estas tre vasta kaj senlima.” La leporo skuis la kapon: “Ne, ne! La ĉielo estas el multaj lumaj rondaj truoj.” La rano diris: “Vi eraras. Se vi ne kredas, iru rigardi ekster la arbaro.” La leporo saltadis el la arbaro. Levinte la kapon, ĝi vidis, ke la ĉielo vere estas senlima. Tiam ĝi honte klinis sian kapon. ■

ESP-NOVAĴOJ

● Esperanto-Ligo de Hubei-provinco okazigis en Wuhan kunvenon memore al la 15-a datreveno de sia fondiĝo. Pli ol 20 samideanoj ĉeestis la kunvenon.

● Laborkunveno kaj memorkunveno por la 8-a datreveno de la fondiĝo de la Qingdao-a Esperanto-Ligo de Shandong-provinco havis lokon en Huanghai-hotelo, la 26-an de majo. Pli ol 60 samideanoj ĉeestis la kunvenon.

● La Orienta Scienc-teknika Kolegio de Anhui-provinco ekhavas en septembro Esperantan kurson por komercado kaj turismo. La lernado daŭros du jarojn.

● La 21-an de aprilo la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis poŝtmarkojn "Verdigi dezertojn". Tiutage la Poŝtmarka Kompanio de Haikou de Hainan-provinco uzis memorigan stampilon en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la stampilo estas samideano Zhang Linrui.

● Ĉe la fondiĝo de la Ĉina Filatela Esperanto-Asocio en la 15-a de aprilo de 1994 oni emisiis memorigan koverton kun teksto en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto estas Ren Yu. 1.6 usonaj dolaroj (3 guldenoj) por unu peco. Se oni aĉetos pli ol 10 pecojn, ĉiu pagigas unu usonan dolaron. Ĝi estas akirebla ĉe la redakcio de EPĈ.

● La Trilanda Renkontiĝo okazis en Aachen de Germanio la

24-an de aprilo 1994. Ĉi tiu renkontiĝo estis la unua kiun organizis la "Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rejno" fondita en oktobro de 1993. Esperantistoj el Germanio, Belgio, Nederlando kaj aliaj tri landoj prelegis, diskutis kaj ekskursis. Du allogaĵoj estis prelegaĵo de Renée Triolle el Francio — "Impresoj pri la aktuala Rusio" kaj referaĵo de Els Kervers-van Tholen el Nederlando pri "La rolo de virinoj en la Esperanto-literaturo". La sekvantra Trilanda Renkontiĝo okazos la 23-an de oktobro 1994 en Remouchamps de Belgio. Kontaktadreso: Jean-Marie Jacques, Place Verte 23 bte 3, B-4800 Verviers, Belgio. Telefono: 087/330292

La kunvenejo estas urba salono kaj la programo konsistas el vizitoj de la grotoj en Komblain-au-Pont kaj iama subtera ŝtonminejo, promenado tra geologiaj vidindaĵoj, ĝenerala asembleo de la Esperanto-Asocio en EMR ktp. Aliĝo kaj informoj ĉe Jean-Marie Jacques.

● La 3-an de aprilo 1994 estis starigita fonduso por la grandega projekto "Konstanta Fonduso de Aŭstraliaj Infanoj por Esperanta Eduko kaj Vojaĝo". S-ino Jana Bogojev akceptis la rolon de la gardistino kaj subskribanto rilate donacojn. Bonvolu sendi la ĉekon, la adreso: Jana Bogojev 73, Newry Str. Floreat Park 6014 Wa, Aŭstralio.

● Inter la 4-a kaj la 9-a de majo 1994, Detlef Meier, la gvidanto de la Esperanto-komunumo de la Amikaro Bruno

Gröning, vizitis Bulgarion. Li prelegis en Razgrad, Ŝumen kaj Sofio pri "saniĝado per spiritaj fortoj laŭ la instruo de Bruno Gröning". La aŭskultantoj ricevis la enkonduko-libron kaj -kasedon en la instruon de Bruno Gröning en la bulgara lingvo, kiuj ambaŭ estis tradukitaj el Esperanto.


● Hanoja Esperanto-Klubo kaj Yumeiho-rondo (Yumeiho: japana diina masaĝo) kun ĝiaj subtenantoj okazigis de la 5-a ĝis la 7-a de aprilo 1994 en la kongresejo de la Medicina Supera Lernejo la Internacian Simpozion pri orienta medicino, en kiu Yumeiho estis unuafoje oficiale prezentita al la medicina fakularo de Hanojo kaj Vjetnamio. La simpozion ĉeestis 60 personoj.

● En Brazilo oni fondis la klubon "Distanca Ŝaltilo" — Internacia Aŭskultado-Klubo pri Esperanto en Radio por kunigi, plifortigi kaj diskonigi radiostaciojn al ĉiuj e-istoj kaj radioaŭskultantoj. Pliajn informojn petu ĉe "La Voĉo de Esperanto", organo de la klubo, bonvolu ne forgesi enmeti korespondkuponojn kune kun via aliĝo. Adreso: Rua Prof. Joao Doetzer, 33, BR. 81.540-190 Curitiba-PR, Brazilo.

● Pro la amaso da leteroj, kiuj daŭre venadas al la malnova Londona adreso de Prof. D-ro Ivo Lapenna, S-ino Birthe Lapenna deziras informi la esperantistaron, ke ekde julio 1992 ŝi translokiĝis al Kopenhago, Danio.

La tuta arkivo de ŝia edzo estas zorge gardita kaj sekurigita, kaj ekde decembro 1993 ĝi troviĝas en ŝia dana domo, Grøndalsvej 30, DK-2000 Frederiksberg, Kopenhago, Danio.

Ŝi petas ĉiujn esperantistojn, kiuj posedas dokumentojn, artikolojn, sonbendojn ktp. de aŭ pri ŝia edzo, sendi al ŝi kopiojn, eventuale kun sciigo de la kostoj, tiel ke ĉio eniru la historian arkivon.



Memorkoverto por la fondiĝo de la Ĉina Filatela Esperanto-Asocio

DIVERSAJ MONEROJ KAJ MONBILETOJ DE NACIMINORITATOJ

Diversaj moneroj kaj monbiletoj de la antikva Ĉinio formis la ĉinan monan kulturon. En la lastaj jaroj oni elterigis multajn monerojn kaj monbiletojn kun naciminoritataj skriboj, kio tre helpis la studon pri ĉinaj moneroj kaj monbiletoj.

La naciminoritataj moneroj kaj monbiletoj estis trovitaj ĉefe en la Interna Mongolio, Ningxia (Ningŝja), Shaanxi (Ŝenŝji), Gansu kaj Xinjiang (Ŝingĝiang), tra kiuj etendiĝis la antikva Silka Vojo. Ili estis emisiitaj en la manĉura lingvo de post la 17-a jarcento kaj en la lingvoj de Ĉjidan, Ŝjiŝja kaj Basiba antaŭ 700-1 000 jaroj, kaj krome estas ankaŭ tiuj de hunoj kaj de la Okcidenta Regiono (Xinjiang) de pli frua tempo.

La studo de moneroj kaj monbiletoj de ĉinaj naciminoritatoj montris, ke Mongola Ĥanejo uzis ĉefe monbiletojn kaj orajn kaj arĝentajn ingotojn sur la vasta teritorio de Eŭropo kaj Azio kaj kuprajn monerojn en tre malmultaj lokoj. En la lastaj jaroj oni plurfoje elterigis en nordokcidenta Ĉinio kuprajn kaj arĝentajn monerojn plej frue aperintajn en la historio de la mongola nacio kaj i.a. monbiletojn, kiujn fakuloj asertis la unuaj nekonverteblaj monbiletoj en la ĉina historio.

Antaŭ ol kapti la ŝtatan potencon, la mongoloj ĉiam uzis safojn kaj ĉevalojn kiel monon. La imperiestro de Yuan-dinastio Kublajo (1260-1294 sur trono) praktikis monsistemon kun papermono kiel ĉefa cirkulanta mono kaj tio influis aliajn landojn. La monbiletoj de la Mongola Ĥanejo kaj Yuan-dinastio aperis duonjarcenton pli frue ol tiuj de Persio, pioniro de aplikado de papermono. Persio, Hindio kaj Germanio imitis Yuan-dinastion en monfarado. Persio presis sur sia papermono ĉinan ideogramon signifantan monon.

La metala mono farita de ĉjidan-oj, nordaj ĉinaj nomadaj naciminoritatoj, en la 10-a kaj 12-a jarcentoj estas ĉiam alte taksata de ĉinaj kaj alilandaj fakuloj. La monero kun vortoj "Vivu Ĉiela Dinastio" trovita antaŭ 30 jaroj estas la ĝis nun konata plej granda monero kun vortoj de ĉjidanlingvo. Ĝi estas tre rara kaj difinita kiel unu el la sep unikaj moneroj de Ĉinio.

Abundis inter la popolo moneroj faritaj de la Okcidenta Ŝja-dinastio, loka reĝimo starigita de dangŝjang-oj en nordokcidenta Ĉinio. La moneroj faritaj de tiu dinastio inter 1053 kaj 1056 kun mulditaj vortoj estas la plej fruaj moneroj de tiu dinastio.

La moneroj emisiitaj de la loka reĝimo de hujhe-

oj, kiuj viglis en la Okcidenta Regiono, inter la mezaj jaroj de la oka jarcento kaj mezaj jaroj de la naŭa jarcento apartenas al la sistemo de la islama mona kulturo. Lastjare oni malkovris kelon de moneroj de hujhe-oj en Artux-gubernio kaj unufoje elkeligis jam 17 000 monerojn kun totala pezo de 130 kilogramoj.

TAJDOMEDICINO

Tajdomedicino, nova scienco leviĝinta en la lastaj jaroj, ludas gvidan rolon en diagnozo kaj preskribado.

Maro altiĝas ĝenerale post 12 horoj kaj 25 minutoj, tial ĝi flusas dufoje ĉiutage. Kaj tiuj du flusoj multe influas la vivon de homoj. La Ŝanhaja Ĉinmedicina Instituto kaj la Orient-Ĉinia Hospitalo faris enketon pri la tempo de morto de 510 pacientoj. Ili miris, ke la mortokvanto de la pacientoj de pli ol 60 jaroj estas plej granda ĉe malfluso kaj malgranda ĉe fluso kaj alttajdo. 80% de la suferantoj de insuficienroj kora, pulma, rena kaj hepata mortis ĉe malfluso kaj tre malmultaj ĉe fluso. Suferantoj de hemoragio (hemoragio de nutrokanalo kaj cerbo kaj hemoragio pro traŭmato, tuberkulozo kaj pulma kancero) plejparte mortis ĉe fluso pro sangelfluo. Ankaŭ apopleksiuoj facile mortis en la sama tempo, dum tiuj apopleksiuoj, al kiuj mankis sango, mortis ofte ĉe malfluso. Ĝenerale suferantoj de miokardia infarkto mortis ĉe fluso, kaj morto trafis ankaŭ aliajn suferantojn de akutaj malsanoj en tiu tempo.

Jam en la antikveco ĉinoj prezentis la vidpunkton "la homa vivo dependas de la ĉielo kaj tero". Kaj tiun vidpunkton subtenas studo de la moderna tempobiologio. La enketo de Ŝanhajo atentigas, ke oni bone flegu kaj protektu malsanulojn ĉe malfluso kaj bone zorgu pri suferantoj de akutaj malsanoj kaj hemoragio ĉe fluso kaj alttajdo (ĉirkaŭ la 15-a ĉiumonate tajdo estas pli granda ol en aliaj tagoj) por laŭeble redukti la mortokvanton.

Aplikante tajdomedicinon, kuracistoj donas grandan atenton al tempo de uzo de medikamentoj, ĉar en konvena tempo medikamentoj, precipe kontraŭkanceraj medikamentoj, havas pli bonan kurac-efikon.

Tajdomedicino opinias, ke ĉiuj ĉeloj (normalaj kaj nenormalaj) de organismo havas sian "biologian horloĝon", aŭ biologian ritmon. Per biologia horloĝo organismo povas percepti la periodan ŝanĝiĝon de la ekstera mondo kaj mem reguligi sian internan ritmon. Tia karakteriza ritmo havas intiman rilaton kun tajdo, kun tago kaj nokto. Se oni bone traktas tiun rilaton, oni povas sin protekti kontraŭ malfeliĉo kaj multe levi la kurac-efikon.



Televida anonco de proksima veter-prognozo


La Ĉina Me Centro

Fotoj de LIU SIGONG


La Ĉina Meteorologia Centro, direktanto de ĉinaj meteorologiaj aferoj, servoj kaj teknikoj, posedas entute 128 telekomunikajn liniojn interligitajn kun tiuj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ekipita per grandaj komputoroj kaj instalaĵoj por meteorologiaj materialoj ricevitaj surtere per satelito, ĝi funkcias ankaŭ kiel regiona meteorologia centro de vetera observado de la monda meteorologia organizo kaj unu el la regionaj meteorologiaj telekomunikaj centroj.

Ĝia ĉefa tasko estas analizi la atmosferan materialon de la tuta terglobo, observi la veteran ŝanĝigon, ĝustatempe doni veter-informojn, servi al la publiko, helpi diversdepartementajn respondeculojn ellabori laborplanon kaj kontentigi diversajn apartajn bezonojn. Samtempe ĝi ŝarĝas sin ankaŭ per tasko interŝanĝi materialojn kun diversaj landoj kaj aliaj daten-centroj.


La domo de la Meteorologia Centro de Ĉinio



teorologia




Por prognozo de veterstato



Meteorologoj traktantaj veter-informojn

En regadejo



Wuhan, ekonomia centro en la landinterno de Ĉinio

de JI PING

SUR la mapo de Ĉinio Yangzi-rivero kaj la Pekin-Kantona Fervojo, kiu trakuras nordan kaj sudan Ĉinion, interkruciĝas en Wuhan, la ĉefurbo de Hubei-provinco.

En la radiuso de 1 200 km kun Wuhan kiel la centro troviĝas la plej riĉa ekonomia regiono de Ĉinio. Tial ekonomikistoj nomas Wuhan la koro de la ĉina ekonomio.

VIGLA TRAFIKA CENTRO

Wuhan el la partoj Hankou, Hanyang kaj Wuchang estas konata jam de antikve kiel trafika centro por naŭ provincoj. Tie la Pekin-Kantona Fervojo kontaktiĝas kun kelkaj ĉefaj fervojoj, kaj tial Wuhan estas grava trafika centro de la landinterno de Ĉinio. Wuhan-haveno estas la plej granda en la meza baseno de Yangzi-rivero, kaj per akva vojo oni povas

atingi 14 provincojn. Junie de 1992, alilanda ŝipo ankriĝis ĉe la nove konstruita doko Qingshan de Wuhan-haveno. Estis la unua fojo por Wuhan-haveno ankri alilandan ŝipon post 1956. Qingshandoko povas samtempe enteni tri 5 000-tonelajn ŝipojn. Ilia jara transporta povo atingis 900 000 tunojn. Post kiam Wuhan-haveno estis malfermita al aliaj landoj, la urbo Wuhan per Yangzi-rivero povas kontaktiĝi kun Japanio, Singapuro, Rusio, Malajzio, Hongkong kaj Aomen. Rezulte de tio, la malnova Wuhan-haveno retrovis sian junecon.

En Wuhan estas konstruita la moderna internacia flughaveno Tianhe, kie povos ekflugi kaj surteriĝi Boeing 747. Nun ĝia unuajperioda konstruado estas finita kaj ĝi povas transporti 4.2 milionojn da pasaĝeroj ĉiujare. En la 50-aj jaroj en Wuhan estis konstruita la Fervoja-Ŝosea Pontego super

Yangzi-rivero. En 1995 super la rivero aperos staja ŝosea pontego el betona armaturo longa je 1 876 m. Tiam ĝi povos transpasi pli ol duonon de la aŭtobusoj, kiuj atendos river-transpason, kaj sekve de tio malstreĉiĝos la trafika ŝtopiĝo.

Kun la rapida disvolviĝo de trafiko kaj telekomuniko Wuhan kontaktiĝos kun pli multaj landoj.


MALNOVAJ ENTREPRENOJ REVIGLIĜANTAJ

La Tekstila kaj Prestinktura Limigita Kompanio Rongze estas kune investita de komercistoj de Hongkong kaj la Dua Prestinktura Fabriko de Wuhan, entrepreno havanta deficiton dum longa tempo. La komercistoj de Hongkong faras ĉiuf flankan administradon al la malnova fabriko en maniero de akcia regado. Tio donis bonan ekzemplon por la grandaj kaj mezgrandaj ŝtataj entreprenoj de Wuhan en reformado farata helpe de alilanda investo.

Poste, la Wuhan-a magistrato deklaris 5 000 entreprenojn de la urbo malfermitaj al aliaj landoj kaj kuraĝigis la deficitajn malnovajn entreprenojn pli rapide sin reformi en manieroj de luado, kuna investo, kunlaboro, aŭkcio, anekso, bankroto, akcia partopreno kaj akcia regado.

Nun en Wuhan estas 170 entreprenoj investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Dank' al alilanda investo, la Wuhan-a Ŝtala Kompanio ekhavis la memdecidan rajton de intertraktado je urba nivelo, tiel ke


SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO



1. Wuhan



La Wuhan-a Pontego super Yangzi-rivero



En la Wuhan-a Ŝtala Kompanio

Foto de ZHAI YULIN

la kompanio havas pli da fleksebleco en ekstera komerco. La kompanio penas por produkti dek milionojn da tunoj da ŝtalo en jaro.

En la vigla disvolvigo de ekonomio, la Wuhan-a magistrato difinis la celon, nome en la fino de la kuranta jarcento Wuhan estos konstruita en bazon de ŝtalo, aŭto kaj alta tekniko kaj centron de financo, cirkulo de mono kaj varoj, trafiko, informado kaj scienca edukado, tiam Wuhan fariĝos internacie moderna urbejo meze de Ĉinio.

ALILANDA INVESTADO EN WUHAN

1992 estis jaro signifoplena por Wuhan. Tiujare Wuhan estis difinita kiel malferma urbo ĉe Yangzi-rivero kaj ekpraktikis favorajn politikojn same kiel ĉemaraj urboj. Poste, Wuhan faris

gravajn paŝojn por reformado kaj pordomalfermo, kio allogis multajn alilandajn entreprenistojn. Grandaj konsorcioj kaj korporacioj de aliaj landoj tie faris investadon. Nun en Wuhan troviĝas 1 411 entreprenoj investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj. 95 projektoj havas investaĵon de kvin ĝis dek milionoj da usonaj dolaroj kaj 30 projektoj havas investaĵon de pli ol dek milionoj da usonaj dolaroj.

En Wuhan alilanda investado estas farata ĉefe por trafiko, energio, ekspluato de bona proprieto kaj altteknika industrio, ekz., la Grupo de Nova Mondo investas por konstrui Wuhan-flughavenon kaj ties ŝoseojn kaj la Stajan Ŝosean Pontegon super Yangzi-rivero; Jiulongcang-grupo de Hongkong investas por konstrui la Elektrejon de Yangluo; la Usona Investa Kompanio Limigita kaj Huazhong-a Politekniko de

Wuhan kune konstruigos la "Sciencan Urbon de la 21-a Jarcento"; la Grupo de Ora Leono de Malajzio projektos, ekspluatos kaj konstruos urbon de altteknika industrio.

"KVAR URBOJ" KAJ "TRI DISTRIKTOJ"

Nun la ekonomio de Wuhan disvolviĝas laŭ nova arango kun "kvar urboj" kaj "tri distriktoj" kiel la ĉefa parto.

La "kvar urbojn" konsistigas la ŝtala urbo de Qingshan, komerca urbo de Hankou, scienc-teknika urbo de Donghu kaj aŭta urbo de Zhuankou kaj "tri distriktojn" — la novteknika ekspluata distrikto de Donghu, ekonomia kaj teknika ekspluata distrikto de Wuhan kaj tiu de Yangluo. En la nacia novteknika ekspluata distrikto de Donghu estas 23 altaj lernejoj, 56 scienc-esploraj institucioj, dek gravaj naciaj laboratorioj kaj pli ol 700 teknik-ekspluataj organizoj, kun ĉ. 70 000 fakuloj. Nun tie aperis 245 altteknikaj entreprenoj kaj ĉiujare ili donas ĉ. 1 000 scienc-teknikajn fruktojn. Entreprenistoj de Usono, Germanio, Japanio kaj Nederlando investas por telekomuniko, mikroelektroniko, softvaroj de komputoro, novtipaj materialoj, bioingenerio, lasera tekniko k.a. ●

En la ekonomia kaj teknika ekspluata distrikto de Wuhan la Aŭto-industria Korporacio Shenlong kune investita de Ĉinio kaj Francio produktos jare 300 000 aŭtojn kaj samtempe entreprenos industriojn de aŭtopecoj kaj altaj teknikoj.

En la ekonomia kaj teknika ekspluata distrikto de Yangluo oni konstruos internacian vartransportan centron de centra Ĉinio, dank' al facila trafiko. Por allogi alilandajn investantojn la Wuhan-a magistrato sin preparas por starigi impostoliberan regionon, permesi al alilandaj bankoj, asekuraj kaj financaj kompanioj fondadon de sia filio en la centro kaj peni por havi la ekza-



Wuhan-haveno

Foto de ZHAI YULIN

En la Komputora kaj Informa
Centro de Sainuo en Wuhan


Foto de LI CHANGJIE

menan kaj aproban rajton funkciigi podetalan komercon kaj merkaton de periode liverataj varoj kune investitajn de Ĉinio kaj aliaj landoj. Krome, la urbo sin preparas ankaŭ por funkciigi biloborson.

Ĉi-jare Wuhan refoje faris grandan varbadon de investantoj kaj akiris sukceson. Zhao Dingxin, urbestro de Wuhan, tiel priskribis la perspektivon de ekonomio de Wuhan: "Hieraŭa Ŝenzhen, hodiaŭa Ŝanhajo kaj morgaŭa Wuhan". Wu Guangzheng, prezidanto de Jiulongcang-grupo de Hongkong, kiu investis dek miliardojn da juanoj en Wuhan, diris, ke en la venontaj jaroj la reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio sin direktos al urboj ĉeriveraj kaj landlimaj. Kiu kaptos Wuhan, kaptos ankaŭ la gravan ĉeneron de la ekonomia disvolviĝo de centra Ĉinio aŭ eĉ de la tuta Ĉinio. S-ro Wu antaŭdiris, ke Wuhan fariĝos alia fokuso por prosperigi Ĉinion. ■

danto de Jiulongcang-grupo de Hongkong, kiu investis dek miliardojn da juanoj en Wuhan, diris, ke en la venontaj jaroj la reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio sin direktos al urboj ĉeriveraj kaj landlimaj. Kiu kaptos Wuhan, kaptos ankaŭ la gravan ĉeneron de la ekonomia disvolviĝo de centra Ĉinio aŭ eĉ de la tuta Ĉinio. S-ro Wu antaŭdiris, ke Wuhan fariĝos alia fokuso por prosperigi Ĉinion. ■





Fakuloj de Ĉinio kaj Nederlando en laboro
Foto de LI CHANGJIE

Parto de Wuhan Foto de LI CHANGJIE



Dazhai hodiaŭ

Dazhai estis fama vilaĝo en la 60-70-aj jaroj en Ĉinio. Ĝi estis ankaŭ raportita en nia revuo. Ĝi siatempe servis kiel modelo de tradicia ĉina agrikulturo. Sed kian ŝanĝigon havas Dazhai en la tempo, kiam reformado kaj pordmalfermo estas praktikataj en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de Ĉinio? Legu artikolon de nia raportisto.

La Red.

DAZHAI, ordinara montvilaĝo en norda Ĉinio, kuŝas inter montoj, kiuj izoligas ĝin de la ekstera mondo.

Fakte Dazhai diferencas de aliaj malriĉaj vilaĝoj. Mi ne scias, kiam tie aperis ŝoseo, serpentumanta sur montoj kaj kunliganta la vilaĝon kun la esktera mondo.

Oni diris, ke la ŝoseo estis malfermita de Dazhai-anoj. Ĝi strikte ligiĝas kun la sorto de Dazhai. Sur ĝi iris sennombraj vizitantoj, kaj ĝi estis malatentita dum kelkaj jaroj, sed nun ĝi reviviĝis.

PROSPERA ESTINTECO

Dum longa tempo Dazhai estis vilaĝo malprospera kaj izolita. Tie la montoj estis kalvaj. La riveroj estis aŭ sekaj aŭ torentaj kaj inundis la kulturatajn kampojn. La malbonaj naturaj cirkonstancoj malabundigis la agrikulturan rikolton kaj la vilaĝanoj vivis en malriĉo kaj malsato.

En la 50-aj jaroj, gvidate de la vilaĝestro Chen Yonggui, la vilaĝanoj kreis kampojn surmonte kaj konstruis akvoutiligajn instalaĵojn. Per sarkiloj kaj siaj propraj manoj ili ŝanĝis la dezertajn montojn en terasajn kampojn, kiuj 3- aŭ 5-obligas la produktokvanton.

Tio estis historia ŝanĝigo de la vilaĝo. La brava spirito ŝanĝi la naturon kaj sian vivmedion de Dazhai povis servi kiel modelo por aliaj malriĉaj vilaĝoj de Ĉinio. Tial

en 1964, prezidanto Mao Zedong alvokis, ke la tuta lando lernu de Dazhai en agrikulturo. Tiel famiĝis la vilaĝo kaj ĉiam vidiĝis tie vizitantoj el aliaj lokoj de Ĉinio, foje la nombro de vizitantoj eĉ atingis 7 000 en unu tago.

NOVA ASPEKTO

En la tagoj, kiam Dazhai estis en la kulmino de sia famo sur kampoj flirtis ruĝaj flagoj kaj vidiĝis sloganoj, sonis mikrofono tuttage. Tiam ĝi estis modelo ne nur de penema luktado kontraŭ malfaciloj sed ankaŭ de alta takso de grenkulturado. Pro tio la vilaĝanoj eĉ ŝanĝis siajn fruktoĝardenojn en maizan kampon, kaj plantis rizon sur montdeklivoj.

Pasis 20 jaroj. Hodiaŭ, homoj, vizitantoj Dazhai, vidis tute alian fizionomion: Sur verdaj montoj ne plu vidiĝas ruĝaj flagoj, nek sloganoj, ne aŭdiĝas laŭtaj sonoj de mikrofonoj. Maizo kaj milio bone kreskas sur ŝtupar-kampo. En pomĝardenoj fuktoj pendas sur arboj. Ĉe la vojoj prosperas persimonoj kaj jugland-arboj. Nova helblua kvinetaĝa domo staras ĉe la enirejo de la vilaĝo. Ĝi estas la Industri-komerca Domo. Mi venis al Dazhai-a Svetera Fabriko, kie brilas lampoj en la laborejoj. Laboristinoj en blanka bluzo kun plena atento laboras antaŭ la maŝinoj. Ili tute diferencas de iliaj gepatroj, kiuj scipovis manipuli nur ŝpatojn.


En la lastaj jaroj ekfunkciis en

Dazhai ĉemiza fabriko, fabriko de konstruaj materialoj, transporta kompanio kaj komerca kompanio. En 1993, la vilaĝo kaj iu Hongkonga kompanio kune investis 17 milionojn da janoj por konstrui silikata-cementan fabrikon kun jara produktokvanto de centmil tunoj. Samtempe ĝi bonordigis du antaŭajn vilaĝajn karbominejojn, malfunkciigis kemian fabrikon pro ĝia malprofito kaj serioza polucio. La vilaĝanoj komencis sian novan karieron sur malfortika bazo.

GRANDAJ ŜANĜIGOJ

Granda diferenco estas inter la batalo kontraŭ malbonaj naturaj kondiĉoj en la 50-aj jaroj kaj tiu por prosperigi la lokon hodiaŭ. Kvankam laŭdinda estas ilia spirito peneme labori por venki ĉiujn malfacilojn, tamen oni bezonas pli profundan reforman spiriton por reordigi la produktan strukturon kaj terkulturadon konforme la ekonomian disvolviĝon en la nova epoko.

Tio ja estas tre malfacila por la vilaĝanoj, kiuj kutimis iri sur malnova vojo, sed nun devas iri sur la vojo tute nova kaj nekonata. Fine de la sepdekaj jaroj la tutlanda kamparo komencis gravan transformadon de la tradicia agrikulturo en varan agrikulturon, adiaŭis la produktan modelon "fari ĉion por kulturi grenojn" kaj ekpraktikis laŭkontraktan respondecan produktosistemon, sin okupis por disvolvi multspecajn entreprenojn kaj prosperigi vilaĝajn entreprenojn.



En la Dazhai-a Svetera Fabriko

Sub tiu situacio, la Dazhai-anoj dronis en ĉagreniĝo kaj ne sciis, kion fari.

La kampara reformado sukcesis en Ĉinio en la sekvantaj dek jaroj: daŭre disvolviĝis la agrikultura produktado, abundaj estis la agrikulturaj produktaĵoj, viglis la kampara merkato, evidente altiĝis la enspezo de ĉinaj kamparanoj. La faktoj edukis la Dazhai-anojn, ke ili finfine forlasis la pezan ŝarĝon, eliris el malfacila situacio, por kuratingi la paŝojn de la tuta Ĉinio.

Tiuflanke, la vilaĝa gvidanto s-ino Guo Fenglian estas bona ekzemplo. Ŝi estis estrino de la vilaĝa "ferknabina" trupo — trupo ekspluatanta dezertan teron. Tiam ŝi ĉiam estis en blua kostumo, kun paro da harplektaĵoj, parolis per laŭta voĉo. En la tagoj, kiam Dazhai estis malatentita, ŝi multe larmis kaj malmulte parolis. Sed post kelkaj jaroj, kiam ŝi vere komprenis la ŝanĝiĝon ĉirkaŭe, ŝi adiaŭis la malnovan memon kaj ŝanĝiĝis preskaŭ en alian homon. Bulkoj krispis sur ŝia kapo. Ŝi vestis sin per nigra eŭropa vesto kun verda trikvesto ene. Printempe ŝi surhavas T-forman ĉemizon.

La plej granda ŝanĝiĝo por ŝi eble estas tio, ke antaŭe ŝi kutimis aŭdi la sloganon "La tuta lando lernu de Dazhai en agrikulturo",

sed nun ŝi volonte lernas la progresajn modelojn de la tuta lando. En 1992, kune kun siaj du kolegoj, ŝi veturis al kamparo de Jiangsu (Ĝjangsu), Zhejiang (Ĝeĝjang) kaj Ŝanhajo por lerni iliajn spertojn en disvolvado de produktado. Poste ŝi, estrante koncernajn personojn de la vilaĝo sesfoje vizitis avangardajn vilaĝojn kaj iliajn entreprenojn de 6 provincoj. Tio multe larĝigis ilian vidkampon. Ŝi konvinkigis, ke la diferenco de Dazhai-anoj kaj la vizititaj lokoj estas ĉefe en la ideologia koncepto. Ŝi opiniis, ke mankas al Dazhai-anoj konscio por disvolvi komercadon kaj ili kontentiĝis nur en vestado kaj mangado.

Poste Dazhai enkondukis intelektan kaj teknikan forton de lan-tekstila fabriko de Jiangyin (Ĝjangjin), Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco por starigi sian propran sveteran fabrikon. Ĝi enkondukis teknikon kaj ekipaĵojn de Taiyuan (Tajjŭan)-a Ĉemiza Fabriko kaj la Ĝenerala Kompanio de la Vilaĝaj Entreprenejoj de Shanxi (Ŝanŝji)-provinco kaj establis sian propran ĉemizan fabrikon. Ekde tiam aperis vilaĝaj entreprenoj en Dazhai.

POR NOVA VIVO

Dazhai ja estis fama, tamen ĝiaj vilaĝanoj vivis vivon ne riĉan. Nun

estas novaj brikaj domoj, tamen multaj vilaĝanoj ankoraŭ loĝas en simplaj kaverndomoj. Antaŭe ĉiuj kaverndomoj estis meblitaj sammaniere: grandaj ceramikaj vazoj por teni grenon kaj akvon kuŝas en angulo de la kaverndomo, kaj terlito aŭ granda ligna lito okupas alian angulon. Kompreneble en la kaverndomoj estis aliaj simplaj ofte uzataj objektoj. Kvankam la kaverndomoj estas varmaj en vintro kaj malvarmetaj en somero, sed ili ne taŭgas por la moderna vivo.

Kun relative rapida ekonomia disvolviĝo de la vilaĝo en la lastaj jaroj, konstruiĝis tie novaj domoj, kaj en la molnovaj kaverndomoj aperis televidilo, lavmaŝino, fridujo kaj modernaj mebloj. Antaŭ iuj kaverndomoj vidiĝas motorcikloj.

En iu bela korto mi vizitis Ja Xinwen (Ĝja Ŝinŭen), junan kamparanon. Li kaj aliaj 50 vilaĝanoj laŭ kontrakto prizorgas 15-hektaran fruktogardenon. Dank' al scienca administrado kaj atento de la komercaj informoj, lia enspezo plialtiĝas jaro post jaro. En 1993 lia kvinmembra familio enspezis 20 000 juanojn.

La 64-jara labor-modelo, kamparano Song Liying ankoraŭ loĝas en malnova kaverndomo. Ŝi estas parolema kaj fervora. Ŝi diris al mi, ke antaŭe la Dazhai-anoj enspezis malmulte sed ili neniam plendis, ĉar tiam ili zorgis nur pri siaj kontribuoj al la ŝtato. Sed pro la socia progreso, oni devas enspezi pli multe pro ilia granda kontribuo. En 1993 la pokapa enspezo de Dazhai-ano atingis 1 350 juanojn, kio estis ne imagebla en la pasinteco. Nun ŝi kaj ŝia edzo ambaŭ emeritiĝis. Ĉiumonate ili ricevas pension po 120 juanojn. En Dazhai la pli-ol-55-jaraj virinoj kaj pli-ol-60-jaraj viroj ĝuas pensiecon. En la vilaĝo estas higiena stacio kaj kultura centro por la kamparanoj. La geknaboj senpage lernas en la elementa lernejo.

La Dazhai-anoj estas praktikemaj. Pasinteco ili ne kredis, ke malriĉeco akompanas la vilaĝon por eterne, kaj hodiaŭ ili ne revas pri milionuliĝo en unu tago. Ili diligente laboras por bela morgaŭo. ■



La restoracio atakata de friponaĵo

SUR SCENEJO

La ŝatata moderna dramo

Fotoj de LIU SIGONG

Rostita pekina anaso estas fama ĉina bongusta manĝaĵo. Sed oni malmulte scias pri ĝia historio.

La moderna dramo "La Unua Domo sub la Ĉielo" prezentita de la Popola Arta Teatro de Pekino rakontas pri Fujude (Fuĝjude), fama restoracio de rostita anaso, fondita en 1864 en Pekino. Pro maljuneco kaj malsano, la mastro de la restoracio Tang Deyuan lasis la restoracion al sia helpanto Wang Zixi (Ŭang Ziŝji) kaj siaj du filoj. Sed lia unua filo amis pekinan operon kaj la dua, luktarton uŝuo, ke la restoracio malprosperiĝis. Por reflorigi la komercon, Wang Zixi rekomendis sian amikon Lu Mengshi por mastrumado. Lu estis saĝa kaj talenta. Fraŭlino Yuchu ofte donis al li konsilojn; kuiristo Luo Datou posedis distingigan teknikon; ĉefkelnero Changgui estis lerta en akceptado de klientoj; kaj la restoracio dungis ankaŭ eminentan kuiriston por pladoj. Dank' al ĉio tio Fujude pli kaj pli reprosperiĝis.


Kiam Fujude famiĝis en la urbo, la du filoj de Tang, influite de klaĉoj, batalis kun Lu pro la profito de la restoracio. Lu devigite forlasis Fujude interalie sub la premo de kanajloj.

Per la prospero kaj malprospero de la restoracio la dramo plene montris la ŝanĝiĝeman vivon de homoj kaj la malfacilan pioniran laboron de la restoracio.

De junio 1986 ĝis nun oni 300-foje ludis tiun dramon en diversaj lokoj de Ĉinio, Japanio, Koreio, Taiwan kaj Hongkong. Per eminenta ludarto kaj pure pekina stilo la dramo bele kaj profunde impresis la spektantojn.




Fraŭlino Yuchu donas konsilojn al Lu Mengshi.



Kuiristo Luo Datou plendas, ke oni aĉetis malbonkvalitan anason.



Ĉefkelnero Changgui mortis pro kolero kontraŭ klientoj.



Kreditoroj venis por repreni la ŝuldojn de la restoracio.

Han Yu pri lernado

Kiel eminenta literaturisto kaj pensulo, Han Yu aktivis inter la literaturistoj kaj pensuloj de Ĉinio en la 8-a kaj 9-a jc. Li kuraĝigis junulojn diligente lerni kaj ne subtaksi sin. Li pledis por lerni de saĝuloj kaj oponis kontraŭ ĵaluzo al kapabluloj.

Samkiel aliaj, ankaŭ mi estas homo,
Kion aliaj povas fari, tion ankaŭ mi povas.

Laboremo progresigas kaj mallaboremo regre-
sigas.

Pripensado sukcesigas la aferon kaj malserioz-
eco ĝin damaĝas.

Ne timu alies nekomprenadon, timu maldili-
gentecon en laboro.

Ne timu maljustan juĝon de aliaj, timu mal-
sukceson en kariero.

Ne ĉiu instruisto estas pli supera ol sia lernan-
to; ne ĉiu lernanto estas malpli supera ol sia
instruisto.

Mallaboremulo ne povas kulturi sin mem,
enviulo timas alies memkulturadon.

Kondamno akompanas sukcesinton kaj mal-
laŭdo virtulon.
(Ĉi tie la aŭtoro vipas la enviulojn)

Ridindas, ke formikoj intencas ekskui arbe-
gon.
(Ĉi tie per "formikoj" oni aludas "enviulojn")

MEM PROVU

NE TRINKU BIERON POST FORTA SPORTADO

Multaj havas la emon trinki bieron post
forta sportado, opiniante, ke ĝi kvietigas soi-
fon, donas energion kaj forigas lacecon. Sed
nun oni trovis, ke trinkado de biero post forta
sportado povas kaŭzi artralĝion.

Iu reŭmatisma esplora centro faris teston,
ke ĉiu el la kvar fortaj viroj eltrinku 633
mililitrojn da biero tuj post 5-minuta forta
sportado. Poste oni ekzamenis ilian sangon kaj
trovis, ke la enteno de ureato en la sango estas
21-oble pli granda ol tiu antaŭ la sportado kaj
la enteno de ksantino en ĝi pliiĝis 500-oble.
Tio montris, ke rimarkinde kreskis la ebleco

de moviĝema artralĝio.

KIEL GLADI SILKAJN VESTOJN?

Surŝprucigu akvon sur silkan veston, en-
metu ĝin en nilonan sakon kaj konservu ĝin
en fridujo por dekelkaj minutoj, kaj tiam
vi povas facile gladi ĝin.

OREL-PINTA TIRADO MILDIGAS LA DOLORON EN LA GORĜO

Laŭ ĝinglŭo-vojoj de la homkorpo mal-
forte tiru la orelpintojn kaj per tio kongestu
la orelojn por malpezigi la premon de la
gorĝo kaj akceli la sekreciaron de la glandoj
makzela kaj langa kaj parotido. Tiam la
gorĝo malseketiĝas kaj la doloro mildiĝas.

Antikvaj portaloj en Anhui

Teksto de LI QIANG

Fotoj de FANG KANGNING

LA fama ĉina pitoreskejo Huangshan etendiĝas tra la suda parto de Anhui-provinco. La bela vidindejo estas punktita de elegantaj antikvaj loĝdomoj, temploj kaj portaloj, konataj kiel antikvaj arkitekturaj mirindaĵoj de Anhui. El ili portaloj estas la plej okulfrapaj. En la provinco konserviĝas granda kvanto da portaloj en variaj stiloj.

Antikvaj portaloj en Ĉinio estas originalaj konstruaĵoj kun arta beleco starigitaj por rememorigi pri famuloj kaj laŭdi iliajn meritojn. Ekz., en Shexian (Ŝeŝjan)-gubernio de la provinco troviĝas la Ŝtona Portalo de Xu Guo (Ŝju Gŭo), kiun oni starigis antaŭ 400 jaroj por laŭdi Xu Guo, ministron de Ming-dinastio (1368-1644).

La portalo de Xu Guo havas kvar flankojn kaj ok kolonojn, en formo de kvadrato. Ĝi nomiĝas ankaŭ "Ok-pieda Portalo". Ĝi, 11.4 metrojn alta, 11.54 metrojn longa en suda-norda direkto kaj 6.77 metrojn larĝa en orienta-okcidenta direkto, estas skulptita el solidaj bluaj ŝtonoj, el kiuj iuj pezas eĉ po 4-5 tunojn. Sur la traboj estas bele gravuritaj feniksoj, birdoj, drakoj kaj rabobestoj. Sidas po unu ŝtona leono sur 12 kolonetoj kun gravuraĵoj de nuboj kaj gruoj. La

vivoveraj leonoj malsimilas unu al alia. La skribaĵoj kun fortaj strekoj sur la tabulo de la portalo estis de eminenta kaligrafo. Oni konstatis, ke en Ĉinio ekzistas nur tiu "ok-pieda" ŝtona portalo.

Antikva libro diras, ke Shexian-gubernio havas 200-300 portalojn, el kiuj 94 restas sendifektaj. Tiaj estas malofte videblaj en aliaj ĉinaj provincoj, ĉu kvante, ĉu arte. La plej tipaj kaj la plej grandiozaj portaloj majestas ĉe la enirejo de Tangyue-vilaĝo:

Sep bluŝtonaj portaloj staras en orienta-okcidenta direkto, en formo de arko. Ĉiu havas kvar kolonojn kaj tri pordojn, kun fasado 8-9 metrojn larĝa kaj alteco de 11 metroj. La ŝtonaj kolonoj sen gravuraĵoj portas simplan stilon, sed aspektas tre impone.

La dispozicio de tiu portalo-grupo spegulas la etikon de la ĉina feŭda socio. Sur la konstruaĵaro viciĝas la ideogramoj "fideleco, fileco, nobleco, honesteco, nobleco, fileco, fideleco", kun "honesteco" en la mezo. Tial ĝi estas valora ne nur por turisma plezurĝuo, sed ankaŭ por studo de la antikva ĉina arkitekturo kaj studo de la politiko kaj kulturo de la dinastioj Ming kaj Qing.

En Xidi(Ŝjidi)-vilaĝo de Yixian(Jiŝjan)-gubernio troviĝas




La Ŝtona Portalo de Xu Guo

grupo da bone konservitaj antikvaj loĝdomoj. Ĉe la vilaĝfino staras alta ŝtona portalo konstruita en 1578 por laŭdi la meriton de vilaĝano Hu Wenguang, kiu funkciis siatempe kiel prefekto. Nun oni nomas ĝin Portalo de Prefekto Hu Wenguang.

Ĝi diferencas de tiuj de Tangyue-vilaĝo per kvin-etaĝa turo sur siaj kvar kolonoj. Oni nomas tian portalon turo-forma portalo.

La Portalo de Prefekto Hu Wenguang, 12.3 metrojn alta kaj 9.95 metrojn larĝa, estas luksa, kun gravuraĵoj de cervoj, gruoj, tigroj, leopardoj kaj drakoparoj kaj tiuj de korteganoj kaj generaloj signifantaj la politikan stabilecon de la lando. Sur la tabulo de la turo estas skribaĵoj laŭdantaj la meriton de Hu. Sur la portalo troviĝas ankaŭ bildo de ok feoj priskribitaj en ĉina legendo kaj tiu de kvin leonoj ludantaj globon. Sur la korbaloj de la fronto kaj flankoj de la portalo estas 32 aĵuraj flugiloj kiel ornamo, kiuj montras la ŝtatoficistan servon de Hu. Ĉe la tegmentrandoj estas 12 suprenlevitaj ornamaĵoj kaj ĉe la tegment-finoj tri paroj da martestudoj. La stanoj testudaj antenoj en formo de ondoj servas kiel fulmoforigilo. Ambaŭflanke de la kolonoj estas paro da ŝtonaj leonoj, kiuj aspektas majeste eĉ post 400 jaroj. ■



Antikva portalo en Lantian

Antikvaj portaloj de Tangyue-vilaĝo





Kvar-pieda portalo en Fengkou



Ŝtonaj skulptaĵoj de antikva portalo



Reliefo sur ŝtona portalo



Novaj vidindaĵoj de la terakota legio de Qin-dinastio



Genuanta terakota arkpafisto

LA 1-an de marto 1994, la kavo n-ro 2 de la terakota legio de Qin-dinastio (221 a.K. — 206 a.K.) estis oficiale ekprifosata. Kaj la mistera vualo de tiu kultura ruino estos iom post iom forŝirata.

La kavoj de la terakota legio situas en la gubernio Lintong, Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco. Printempe de 1974 tieaj kamparanoj trovis fragmentojn de terakotaj soldatoj, kiam ili fosis puton. Arkeologoj faris esploradon kaj prifosadon kaj certigis, ke tie estas granda kavo de terakotaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro (259-210 a.K.) de Qin-dinastio kaj post tio oni trovis du aliajn kavojn kaj unu ruinigitan kavon. Oni taksis, ke la 3 kavoj kovras entute pli ol 20 000 kvadratajn metrojn kun ĉ. 8 000 terakotaj militistoj kaj ĉevaloj, pli ol 100 militĉaroj kaj dekmiloj da veraj armiloj. La terakotaj militistoj havas malsuprajn membrojn, torakon, suprajn membrojn, kapon kaj soklon. La terakotaj ĉevaloj konsistas el kapo, kolo, torako, piedoj kaj vosto. Ĉiuj tiuj membroj estis faritaj aparte kaj kunigitaj poste kaj bakitaj en fornego fine.

La eltrovo forte mirigis la arkeologojn, ĉar en la historiaj libroj legiĝas multaj notoj pri la maŭzoleo kaj subteraj objektoj, tamen legiĝas neniu vorto pri la giganta imperiestra armeo, pro tio ĝi estis sekreto dum longaj jaroj.

La malkovro de la terakota legio de Qin-dinastio faris sensacion en la tuta mondo. Oni opinias, ke tio estas la plej grandioza arkeologia eltrovo en la nuna jarcento. S-ro Chirac, eksĉefministro de Francio, kun emocio diris post la vizito: “En la mondo estas 7 mirakloj, la terakota legio de Qin-dinastio povas esti rigardata kiel la 8-a.” Decembre de 1987 Unesko enskribis la maŭzoleon de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, inkl. de la kavoj de la terakota legio, en la liston de la kulturaj heredaĵoj de la mondo.

Ekde la meza periodo de la 70-aj jaroj ĉinaj arkeologoj faris prifosadon de parto de la kavo n-ro

1 kaj tuto de la kavo n-ro 3. Oni konstruis tie eksponajn halojn kaj komencis eksponi ilin en la 1-a de oktobro 1979 kaj septembre de 1989 respektive. Ĝis hodiaŭ ilin jam vizitis 26 milionoj da ĉinoj kaj eksterlandanoj. Krome oni eksponis terakotaĵojn ankaŭ en Japanio, Usono, Britio, Francio kaj aliaj pli ol 20 landoj kaj regionoj. La eksponado altiris al si 10 milionojn da vizitantoj.

Dum eksponado de la kavoj n-ro 1 kaj 3 ĉinaj arkeologoj faris koncentran prospektoradon al la kavo n-ro 2 kaj provprifosadon de kvarono de ĝi. Nun oni jam konas ĝiajn subterajn cirkonstancojn.

S-ro Yuan Zhongyi (Jŭan Ĝongji), estro de la arkeologia taĉmento pri la terakota legio de la maŭzoleo, rakontis, ke laŭ la konataj materialoj la tri kavoj distingiĝas ĉiu per siaj propraj trajtoj. En la kavo n-ro 1 estas plej granda infanteria formacio. La kavo n-ro 3, malgranda kun malpli da terakotaĵoj, estis komandejo de la tuta armeo. La kavo n-ro 2 estas mezgranda. Ĝi kovras 6 000 kvadratajn metrojn, kie povas elteriĝi 1 300 terakotaj soldatoj kaj ĉevaloj kaj 80 militĉaroj. Tie estas piedsoldatoj, rajdistoj, ĉaroj kaj arkpafistoj. Ĝi estas elita parto de la terakota legio de Qin-dinastio.

La kavo n-ro 2 situas je 20 m. nordoriente de la kavo n-ro 1. Ĝi estas ortilo-forma, tunela konstruo el tero kaj ligno, je 5 m. sub la tersurfaco. Laŭ la arkitektura strukturo kaj dispozicio de la terakotaĵoj la kavo povas esti dividita en 4 partojn.

La unua parto staras antaŭe de la formacio. Ĝi konsistas el 174 starantaj pafistoj en malpeza kiraso kaj 160 genuantaj pafistoj en peza kiraso. Ili ĉiuj estas kun pafarko en la manoj. La starantaj estas en la ekstera parto de la formacio, dum la genuantaj en la mezo de la formacio. La formacio montras, ke en batalo la soldatoj povas arkpafi alterne starante kaj genuante.

Dekstre estas la dua parto de la formacio, konsistanta el 64 militĉaroj ĉiu kun 3 soldatoj.

Meze de la formacio estas la tria parto. Tie estas 19 militĉaroj, malmultaj piedsoldatoj kaj rajdistoj.

Maldekstre de la kavo estas la kvara parto de la formacio. Ĝi konsistas el pli ol 100 soldatoj rajdantaj sur ĉevaloj.

La kvar malgrandaj partoj de la formacio konsistantaj el kvar specoj de militistoj troviĝas unu en alia. Ili povas libere disigi kaj kuniĝi laŭ la bezono de batalo. La terakota legio montras la vivecan bildon de la antikva batalo. Tia aranĝo estis la unuafaja eltrovo en la ĉina arkeologia historio. La rajdistoj en la kavo n-ro 2 estas historiaj objektoj, la plej fruaj, plej grandnombraj kaj plej grandaj, kiujn oni konas hodiaŭ. Laarifosado de la kavo n-ro 2 donis pli abundajn, pli konvinkajn materialojn por studi la politikon, ekonomion, militan sciencan kaj kulturon de Qin-dinastio kaj tiujn de la antikva Ĉinio. Ĝi estas tre valora en scienca esplorado.



Esplorado de la kavo de terakota militisto

La konstruata muzeo de la terakota legio de Qin-dinastio estos granda muzeo kombinanta arkeologion, protekton de historiaj objektoj kaj sciencajn esploradojn kun la turisma afero.

La ekspona halo de la kavo n-ro 2 ekkonstruita novembro de 1988 kaj finkonstruita antaŭ nelonge estas en formo de ortilo, kun totala areo de 17 016 kvadrataj metroj, kiom du piedpilkaj ludejoj. La halo el polurita nigra granito estas trapeza, simila al granda moderna sporthalo. Oni povas rigardi, irante laŭ la rando de la kavo aŭ en la verandoj supra kaj malsupra.

La halo estis projektita laŭ altaj normoj de lumigo, ventolado, sekureco, elektrizado, akustiko, kontrolo kaj kontraŭhumidaj rimedoj. La halo ĉiam estas en taŭga temperaturo kaj taŭga humideco. Sur la muroj en kaj ekster la halo estas dekoj da reliefoj de figuroj de soldatoj el blanka marmoro kaj verda granito. Estas densa la kultura etoso de la ekspona halo, kio faris la konstruaĵon mem vidindaĵo.

Arkeologoj konigis, ke laarifosado de la kavo n-ro 2 estas malfacila laboro, kiu estos plenumita post 5-7 jaroj aŭ pli longa tempo. La unuaj elterigitaj objektoj de la kavo n-ro 2 estos eksponataj en la komenco de oktobro 1994. Tiam la vizitantoj povos propraokule vidi, kiel oniarifosas la kavon kaj riparas la terakotajn figurojn de Qin-dinastio. ■



La Flora Festo de ji-oj

Fotoj de CHEN WEISHOU



Plukado de albizioj



Ji-a maljunulo kul-
tanta la dion de al-
bizioj

Antaŭ la festkun-
veno



Ji-oj, kiuj loĝas en Dayao-gubernio, montregiono en Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, adoras albizon (*Albizzia julibrissin*) kaj ĝin rigardas kiel simbolon de feliĉo. En la 8-a de la dua monato laŭ la ĉina luna kalendaro, ili plukas surmonte albiziojn kaj ornamas per ili kamporandojn, pordojn, instrumentojn kaj kornojn de bovoj kaj kaproj por peti bonan rikolton kaj prosperon. Tio estas la tradicia Flora Festo de ji-oj.

En tiu tago ji-oj, en festaj vestoj kaj kun belaj floroj sur la kapo, venas al montsuproj kun parencoj kaj amikoj, kunportante rizvinon kaj bongustajn manĝaĵojn. Ili gaje trinkas kaj esprimas bondezirojn unu al alia. Gejunuloj elektas sian amat(in)on en kantado kaj dancado. Ili reciprokas albiziojn kiel donacon pro amo.



Geamantoj



Flor-ornamo sur-
kape de kapro

Nova vivo de la “nacioj sur

EN la pasinteco la nacimalplimulto en la nordo de Ĉinio, kiaj mongoloj, tibetnacioj kaj kazahoj, vivis nomade kaj estis nomataj nacioj sur ĉevalo. La tieaj primitivaj produktometodoj kaŭzis malfortan ekonomian bazon, postigintan vivmanieron kaj malbonan higienan staton. En la pasintaj pli ol 40 jaroj oni faris grandskalan konstruadon de paŝtejoj, preventadon kaj kuracadon de malsanoj, plibonigon de loĝkondiĉoj k.a. De la lastaj jaroj rimarkinde ŝanĝiĝis la paŝtejoj.

VIGLA DOMKONSTRUADO SUR STEPO

Mencianta la stepan vivon, oni nature asocias ĝin kun blankaj jurtoj kaj tendoj punktantaj la senliman stepon. Tiuj tradiciaj loĝejoj nun ankoraŭ allogas turistojn, tamen nemalmultaj nomadoj jam loĝas en brikaĵoj. Statistikoj raportas, ke pli ol duono de la paŝtistaj familioj en la kvar ĉefaj paŝtejoj de norda Ĉinio fiksloĝas kaj 90 procentoj de la paŝtistoj en la Interna Mongolio havas fiksloĝejon. La postiginta tradicia nomadismo jam ne povas adaptiĝi al la disvolviĝo de la moderna produktado kaj la kreskanta bezono de la socio pri brutoproduktaĵoj. Nur grandskala fiksloĝiĝo de paŝtistoj kaj moderna brutobredado prosperigos la paŝtejan ekonomion kaj levos la materian kaj kulturen vivnivelon de la paŝtistoj.

La fiksloĝado de paŝtistoj kreis kondiĉojn por disvolvi la paŝtejan ekonomion, plibonigi la edukon kaj higienan staton de la paŝtejoj kaj prosperigi diversajn

entreprenojn kun la sekundara kaj terciara industrioj kiel la ĉefaj. Tiu ŝanĝiĝo videblas ankaŭ en la vigla domkonstruado en la paŝtejoj.

En iuj paŝtejoj oni faris akvo-utiligan konstruadon per importita kaj ĉeloke kolektita kapitalo. Dank' al tio, la antaŭa dezerto fariĝis irigaciebla herbejo kaj la paŝtistoj tie fiksloĝas. Sur la stepo Altajo de Xinjiang (Ŝinĝjang) blankaj domoj dissemiĝas inter verdaĵoj. Ĉirkaŭe kanaletoj, forstoj kaj vojetoj interkruciĝas, paŝtiĝas bovoj kaj ŝafoj kaj 5 200 familioj de kazahaj paŝtistoj sur la stepo fiksloĝis en novaj vilaĝoj. Ili transloĝiĝis el terkabanoj en helajn kaj larĝajn brikdomojn. Paŝtistino Sangji (Sangĝji) diris: “Antaŭe, kiam ni loĝis en jurto, ĉio estis farata en ĝi, ekz., preparado de manĝaĵoj, akceptado de gastoj kaj legado. Nun ni loĝas en brikdomo el dormoĉambro, kuirĉambro kaj 20-kvadrat-metra salono.”

Enketo pri la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio raportas, ke 72% de la novaj domoj konstruitaj de post 1992 estas el brikoj kaj la pokapa loĝareo estas 14 kvadrataj metroj.

KUMULA ENTPRENADO DE BRUTOBREDADO KAJ KOMERCADO

La 46-jara paŝtisto Gengga sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo elspezis 60 000 juanojn por konstrui etaĝdomon. Li fiere diris: “Mi, la unua el la paŝtistoj de la gubernio, konstruas privatan etaĝdomon. Kun plankareo de 193 kvadrataj metroj ĝi konsistas el salono, legoĉambro kaj banĉambro kaj estas provizita per

varmotubaro.”

Gengga estas tibet-nacia paŝtisto, kiu plej frue komercis. En 1988, kiam li paŝtis bovojn kaj ŝafojn, li ekfunkciigis ĉiovendejon en regiono koncentre loĝata de paŝtistoj. Nun la ĉiovendejo konsistas el 11 ĉambroj, siatempe el du.

Sur la vasta norda stepo de Ĉinio pli kaj pli multaj paŝtistoj ŝanĝas sian ununuran brutobredadon, kiel Gengga. Ili entreprenas ankaŭ konstruadon, prilaboradon de brutoproduktaĵoj kaj turismajn servojn kaj funkciigas restoraciojn. En Xinjiang estas pli ol 50 000 tiaj individuaj entreprenantoj. En la Interna Mongolio 200 000 paŝtistoj anstataŭe okupiĝas pri minekspluatado, prilaborado de brutonutraĵoj kaj laktaĵoj. La paŝtistoj en tiuj kampoj ne nur pliiĝas sian enspezon, sed ankaŭ ludas bonan rolon en la ekonomia disvolviĝo.

PLI DA ELSPEZO POR LA VIVO

De la lastaj jaroj la enspezo de paŝtistoj en la Interna Mongolio multiĝas jaro post jaro, kaj 90% de la paŝtistoj en la malriĉa regiono jam forlasis malriĉecon. Krom elspezi por plibonigi sian vivon, aĉeti maŝinojn kaj fari fundamentan konstruadon por brutobredado, la paŝtistoj faras tion ankaŭ por disvolvi la edukon aferon de la paŝtejoj.

Paŝtistino Tao Ketao en la Interna Mongolio ne ŝparas monon por sendi siajn gefilojn al lernejo. Ŝi kaj ŝia edzo bredas 650 brutojn, tamen ili ne postulas la helpon de siaj gefiloj, timante, ke tio malhelpos ilian lernadon. La unua filo lernas en universitato


ĉevalo”

en alia provinco, la dua filo kaj filino lernas ĉeloke. La supre menciita paŝtistino Sangji elspezas ĉ. 10 000 juanojn ĉiujare por lernado de siaj infanoj. Ŝi diris: “Indas elspezi tiucele, ĉar brutobredado kaj komercado ja bezonas sciojn.”

La diversnaciaj paŝtistoj bone vidas, ke scioj signifas riĉaĵon. Ili devokonscie elspezas por edukado. La profesiaj mezlernejoj en la paŝtejoj de la Interna Mongolio estas bonvenaj al la gefiloj de paŝtistoj.

En la lastaj kelke da jaroj la vivo kaj spirita fizionomio de la paŝtistoj en la nacimalplimultaj regionoj ŝanĝiĝis radikale. Enketo montras, ke en la Interna Mongolio ĉiu paŝtista familio bredas meznombro 200 bovojn kaj ŝafojn, ĉiu centoj da paŝtistaj familioj havas 60 televidilojn, pli ol triono de la paŝtistaj familioj — motorciklojn kaj ĉ. duono de ili — ventodinamojn. Pli kaj pli multaj paŝtistoj vojaĝas en diversaj lokoj de la lando. Juna paŝtisto Yang Jinhong kaj lia novedzino vojaĝis duonmonaton en iuj grandaj urboj por pasigi mielan tempon. Ili revenis kun multe da koloraj fotoj kaj libroj pri brutobredado. Li diris: “La stepo estas vasta, sed la ekstera mondo pli ĉarma.”

En la lastaj jaroj la paŝtistoj elspezis pli multe por manĝaĵoj kaj vestaĵoj. Antaŭe sur ilia manĝotablo estis nur rostita rizo, buterteo kaj ŝafaĵo. Nun krom rizaĵo kaj farunaĵo, estas ankaŭ diversaj pladoj. “Preni nutroriĉajn manĝaĵojn, porti belajn vestojn kaj loĝi komforte” jam klare manifestas la aktualan vivon de diversnaciaj paŝtistoj de Ĉinio. ■



Novaj loĝdomoj de kazaĥoj kaj ilia sunenergia elektrejo



Gasforno uzata en la familio de mongola paŝtistino Erdun Gaowa (dekstre)



Tibetaj paŝtistoj estas pretaj vendi bovojn kaj ŝafajn felojn.

Tri ĉinaj virinoj

EN la antikveco ĉinoj ofte diris: “En la mondo estas diversaj profesioj kaj ĉiu el ili povas elkulturi eminentulojn.” Tamen tio estis tre malfacila en la antikveco. Nun en Ĉinio la virinoj povas skribi novan paĝon en la historion per siaj agoj. Profesiaj virinoj pli kaj pli multigas. Ili havas multajn okupojn, malpermesitajn antaŭe por ili. Per siaj saĝo kaj kuraĝo ili rikoltis grandajn sukcesojn. Nun en Ĉinio laboras multaj eminentaj virinoj.

SUR ARKTO, ANTARKTO KAJ QOMOLANGMA

Eble en la mondo nur tre malmultaj estis en Arkto kaj Antarkto de la terglobo, por ne paroli pri tiuj, kiuj estis en la du regionoj kaj Qomolangma. Sed s-ino Li Leshi estas la unua, kiu atingis la du

Li Leshi (maldekstre) kaj Guo Xiaogang, estro de la Ĉina Antarkta Ekspedicio, sur ŝipo al Antarkto



regionojn kaj Qomolangma.

Novembre de 1985, helikoptero transflugis neĝkovritan insulon Reĝo Georgo kaj surteriĝis sur la kurejo de la ĉina aerodromo en Antarkto. Li Leshi eliris el la helikoptero. Ŝiaj rigardoj trafis la flirtantan ruĝan flagon kun kvin steloj. Tio rememorigis al ŝi pasintaĵojn. Antaŭe Ĉinio ne havis sian propran scienc-stacion en Antarkto kaj ĉiufoje, kiam oni faris voĉdonon, ĉinaj delegitoj devis eliri el la kunvenejo kaj atendi eksterdome. Kaj kiam ŝi estis antaŭ la ĉina stacio, ŝi sentis fierecon.

La vojaĝo al Antarkto larĝigis ŝian vidkampon kaj kun plena memfido ŝi sin ĵetis en la streĉan esploradon pri la ekologia medio de la terglobo. Reveninte de la regiono, ŝi publikigis sian fotoalbumon “Songo en Antarkto”. Post ok monatoj ŝi sin direktis al Arkto, kie ŝi kunvivis kun eskimoj tri semajnojn, spite al la frosto de pli ol 40 gradoj sub la nulo. Ŝi metis ŝtonpecon el Antarkto sur la teron de Arkto kaj per tio ŝi realigis sian deziron stari sur la du regionoj.

Julie de 1992, Li Leshi, membro de la ekspedicio de Ĉinio, iris al Qomolangma, la plej alta montpinto de la mondo, por fari esploradon. Ŝi estis la unusola virino de la ekspedicio. Por foti la naturan pejzaĝon de la neĝkovritaj montoj kaj fari sciencan esploraĉon, ŝi dufoje surgrimpis la glaciriveron Dongrongbu. En la unua fojo ŝi malsukcesis, tamen ŝi ne perdis la kuraĝon sed faris provadon refoje. La vojo estis plena de rokoj, iuj apikaj eĉ je 50-60 gradoj. Je ĉiu paŝo oni devis sin gardi kontraŭ eventuala ŝoviĝo de la tero kaj la krutaĵo super la kapo. Plurfoje ŝi anhelis, vidis nebulon antaŭ la okuloj kaj sentis, ke la surdorsa fotoaparato kvazaŭ faligos ŝin per granda pezo. Tiumomente en ŝia kapo estis nur unu ideo: “Mi persistos! Kaj neniel mi falu!” Finfine ŝi atingis la celon.

Fine de 1993, Li Leshi sukcese okazigis la ekspozicion de la fotoj, faritaj de ŝi en la du regionoj kaj Qomolangma. Ŝi estas kaj fotistino kaj sciencistino. Per fotoaparato ŝi registris la detruigon de la naturo por vekti la publikan atenton pri la estonteco de la terglobo.

POR OAZIGI DEZERTON

La 15-a de oktobro 1993 estis la 13-a monda grenatago de UN. Tiutage en Bankoko, la ĉefurbo de Tajlando, okazis soleno. En la nomo de la Grenakaj Agrikultura Organizo de UN tajlanda reĝidino Siringhorn donis la medalojn Rao al iu ĉina virino kaj du kamparanoj de Hindio kaj Tajlando. La premiita ĉinino estis Niu Yuqin (Niŭ Juĉin), kontraŭsablaspertulino de Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco.

Jam en la infanaĝo Niu konis la popolkanton:

*Furiozas sablovento sur la ĉielo,
Malfacile kreskas plantidoj sur la tero.*

*Sablo flava kovras kampojn, englutas domojn,
Oni migras aliloken de la katastrofo.*

La tieaj popolanoj estis atakataj de sablovento generacio post generacio.

Antaŭ longe venis al Niu en la kapon la ideo arbarizi dezerton, kontraŭbatali sablon kaj ŝanĝi la postĝintecon. En 1983 laŭ kontrakto ŝi ekkulturis 1 300 hektarojn da sablaj kampoj por fari eksperimentadon. Kun sia edzo ŝi esploris dekojn da sablaj montetoj kaj finfine ellaboris planon por jungi sablon. Ŝi dividis la 1 300 hektarojn da sablaj kampoj en tri partojn kaj plantis sur ili salikson (*Salix cheilophila schneid*), poplon kaj karaganon (*Cara-gana korshinskii kom*). Por aĉeti plantidojn ŝi forvendis siajn bovojn, ŝafojn kaj porkojn kaj prunteprenis monon de banko. Per tiu mono ŝi aĉetis arbidajn kampojn kaj herbosemojn.

Nelonge post kiam ili plantis 100 000 arbidajn sur la sablejo, sabloventego elradikigis duonon de ili. Antaŭ tiu forta bato ŝi ne perdis kuraĝon, sed refoje faris plantadon kaj butis la vegetaĵojn.

Dank' al ŝia diligenta laborado, sur la sablaj kampoj aperis retoj da arboj. Antaŭ la oazigita dezerto ŝi kun plena memfido diris: "Post nelonge sur mia forstumejo mi kulturos glicirizon, bupleŭron kaj aliajn drogherbojn. Mi funkciigos ankaŭ prilaborojn de ligno, fabrikan de salikbranĉaj plektaĵoj kaj fabrikan de laktaĵo." Ŝi kaj ŝiaj samvilaĝanoj konstruis ŝoseon kaj starigis akvoturon.

VELDISTINO DE ŜIPKONSTRUEJO

Guo Linghua estas ordinara laboristino. 19-jara, ŝi veldistiniĝis al ŝipkonstruejo. Dank' al sia diligenco, ŝi rapide progresis en lernado. Post la finiĝo de metilernado ŝi partoprenis konkurson de veldado. Ŝi kaj iu specialigita veldisto kune okupis la unuan lokon. Post tio ŝi pli diligente lernis la teknikon. Preskaŭ en ĉiuj ferioj ŝi legis teknikan libron pri veldado. Pasis kelkaj jaroj kaj ŝi fariĝis eminenta veldistino.



Guo Linghua (dekstre)

Komence de la 80-aj jaroj la ŝipkonstruejo komencis pogrande fari eksportotajn ŝipojn laŭ la internaciaj normoj. La eksterlandaj ŝipmendintoj postulis, ke la laboristoj havu internacie aŭtoritan ateston, alie ilin ne ekspertizos la ŝipojn. Por konstrui 69 000-tonelan cisternoŝipon por Norvegio, la fabriko elektis 70 lertajn veldistojn por partoprenigi ilin en la ekzameno aranĝita de la Norvega Registaro de Ŝipoj. La ekzameno estis malfacila. Guo Linghua sukcese trapasis la ekzamenon kaj akiris la ateston. Nun ŝi havas la atestojn de la norvega, usona, japana, brita kaj ĉina registaroj de ŝipoj.

Tiel en la laboro por solvi teknikajn malfacilojn en konstruado de eksportotaj ŝipoj neniam mankis Guo Linghua. Somere de 1982, kiam en la ŝipkonstruejo oni konstruis la unuan eksportotan levplatformon de Ĉinio por bori putojn en maro, oni devis veldi sur kvar kolonoj 40 m altaj kaj 2 m larĝaj. La laboro estis malfacilega. Ŝi kaj aliaj veldistoj laboris kvar tagojn kaj kvar noktojn kaj bone plenumis la taskon.

En la pasintaj 26 jaroj Guo ĉiam diligente laboris sur la veldista posteno. En 1993 la fabriko konstruis kvar ŝipojn kaj la de ŝi gvidata grupo prenis sur sin la taskon veldi la ŝlosilajn partojn kaj antaŭplenumis la taskon je 20 tagoj. Antaŭ nelonge ŝi estis honorita de la Tutlanda Federacio de laborsindikatoj de Ĉinio kiel unu el la 10 eminentaj laboristoj. ■

La kvara konkurso de EPC-legado finita

Nun finiĝis la kvara konkurso de EPC-legado, komencita novembre de 1993. Post lotumo ni anoncas, ke jenaj samideanoj sukcesis en la konkurso.

Gajninto de la unuagrada premio: **ROBINSON MATTOS** (Brazilo). Li ricevos kaligrafian verkon faritan de ĉina kaligrafo Feng Dabiao.

Gajnintoj de la duagrada premio: **ARANYOSI MARGARETA, DIETRICH MEUSEL, EVA BENICKA, IVÁN TÜNDE, J. CRUZ FERREIRA SILVA, MARIJA kaj BRANKO REPAC, NINA ELISEEVA, SANDRINE ROCCA, SZÜCS IRENE, VLADIMIRO VASILJEV.** Iliaj premiaĵoj estas miniatura simio, metiartaĵo farita de s-ro Cao Yijian, kaj ŝtofpeca bebo farita de s-ino Zhang Qi.

Ni esperas, ke pli da legantoj partoprenos en la baldaŭa kvina konkurso de EPC-legado.

La Red.

Zhang Datong, diligenta fizika instruisto

JENE estas notoj, eble malofte videblaj: Aŭtune de 1991 Wang Tairan (Ŭang Tajjan) kaj Ren Yuxiang (Ĵen Juŝjang), lernantoj de la Dua Dependa Mezlernejo de la Orient-Ĉinia Normala Universitato de Ŝanhajo, gajnis la oran medalon en la 22-a Monda Olimpika Konkurso de Fiziko por Mezlernejoj okazinta en Kubo. Ili estis ne nur samlernejoj, sed ankaŭ samklasanoj;

En 1992, en la 9-a Tutlanda Konkurso de Fiziko 3 lernantoj de la 2-a klaso de tiu supera mezlernejo venkis multajn rivalojn de la 3-a klaso de ŝanhajaj superaj mezlernejoj kaj gajnis la unuan, duan kaj kvaran lokojn de Ŝanhajo;

Septembre de 1993, en la ŝanhaja konkursejo de la 10-a Tutlanda Konkurso de Fiziko por Mezlernejoj 11 partoprenantoj de tiu lernejo enviciĝis inter la unuaj 20 elstarantoj, 5 el ili inter la unuaj 10 elstarantoj kaj 2 el ili gajnis la unuan kaj duan lokojn;

Oktobre de 1993, en la 10-a Tutlanda Finalo de Fiziko por Mezlernejoj okazinta en Changsha, ĝiaj lernantoj Yang Liang kaj Zhu Feng (Ĝu Feng) gajnis respektive la ĉampionecon kaj subĉampionecon; kaj Yang Liang gajnis ankaŭ la unuan lokon en la totala poentaro kaj akiris plej altajn poentojn en teorio kaj eksperimento.

Maje de 1994, per sia unua loko en la totala poentaro Yang Liang estis elektita kiel membro de la ĉina delegacio por la 25-a Monda Olimpika Konkurso de Fiziko por Mezlernejoj.

Tiuj elstaraj sukcesoj faris sensacion inter la ĉinaj mezlernejoj. Ĉar ĉiuj tiuj premiitoj estis lernantoj de fizika instruisto Zhang Datong (Ĝang Datong) de la Dua Dependa Mezlernejo de la Orient-Ĉinia Normala Universitato de Ŝanhajo, nature oni turnis sian atenton sur lin: Kian magian povon li havas en instruado?

Jam en la junaĝo Zhang Datong revis grimpi supren al la pinto de la monda fiziko. Tamen li, kiu ŝatas ankaŭ sporton, fariĝis studento de sporta instituto. Poste, kiam li laboris kiel sporta instruisto en mezlernejo, li helpis 4 lernantojn de sia flugpilka



Instruisto Zhang Datong

teamo en fiziko, kaj pli poste, tiuj 4 lernantoj eniris en famajn universitatojn. Kvankam Zhang ne ricevis regulan altlernejan edukon pri fiziko, tamen li estis diligenta en memlernado kaj akiris bakalaŭrecon tiurilate. 30-jara, li finfine ekstaris sur la podio de fizika instruado. Li pensis, ke li ne povas stari sur la monda fizika fronto, li do esperis, ke liaj lernantoj sukcesos en tio.


Ofte oni timas fizikon pro ĝiaj monotonaj difinoj kaj abstrakta pensado. Sed en agrabla atmosfero Zhang kondukis siajn lernantojn en fizikan pordegon en la unua fizika leciono. "Fiziko similas al alloga, bela paradizo kun impona konstrua sistemo," li konigis tiun sciencon al siaj novaj lernantoj per la frazo de germana fizikisto Max Felix Theodor von Laue. Li ege amas tiun sciencon. Por li la fizikaj difinoj estas belaj freskoj en halo kaj sciencaj diskutoj — kortuŝaj simfonioj; novaj fizikaj eltrovoj kvaŭzaŭ montras al li pli novan mondon, malferminte la

pordegon de la halo...

Kompreneble, konigante al siaj lernantoj Galilejon, Kopernikon, Einstein, Neŭtonon kaj Arkimedon, li ne forgesis akcenti, ke la disvolviĝo de fiziko dependas de bravaj posteuloj.

La unua fizika leciono allogis la lernantojn. En la sekvanta tago Zhang ricevis 2 slipojn. Unu el ili estis skribita de Wang Tairan: "Mi penas kuratingi kaj superi ilin." La alia venis de Ren Yuxiang: "Mi dediĉos min al scienco!" Yang Liang, Zhu Feng kaj aliaj pli junaj kamaradoj aŭdis de ili pri instruisto Zhang, lin vizitis kaj fariĝis liaj kromlernantoj.

"Se ni ne estas ekstreme saĝaj, ni devas esti eks-



S-ro Zhang Datong kaj liaj lernantoj Ren Yuxiang (meze) kaj Wang Tairan (dekstre)

treme diligentaj," diris Zhang. Li ellaboris por ili progresigan lernoplanon, t.e. fini memlernadon de la fizikaj lecionoj por superaj mezlernejoj, diplomiginte el malsupera mezlernejo; fini iujn fizikajn lecionojn de la unua kaj dua klasoj de altlernejo, lernante en la unua klaso de supera mezlernejo; samtempe bone koni diverslandajn ekzamenajn demandojn kaj plenumi respondajn eksperimentojn; partopreni ŝanhajan konkurson de fiziko por superaj mezlernejoj, lernante en la 2-a klaso de supera mezlernejo, kaj tutlandan kaj mondan konkursojn de fiziko, lernante en la 3-a klaso de supera mezlernejo.

Por tiu celo Zhang kaj liaj lernantoj plenenergie strebis. Foje li malsaniĝis, sed li ankoraŭ gvidis la kurson malgraŭ la febro; por fari eksperimenton ili ĉiuj restis longe en laboratorio nur kun kelkaj pantanĉoj; ili neniam ĝuis feriojn somerajn nek vintrajn, ĉar ili sciis, ke estas malfacile sukcesi en la fizika kampo, se oni lernas fizikon nur en lecionho-

roj. Zhang donis siajn adresojn kaj telefonnumeron al siaj lernantoj, por ke ili konsultu lin en ajna tempo, kiam ili havas problemojn.

Idealo, celo kaj persistemo, nomata de Zhang trilogio de lukto, estas lia devizo por kulturaj elstaraj lernantoj.

Zhang tre zorgis la sanon de siaj lernantoj. Kune kun ili li ofte kuris, ludis pilkon kaj ekskursis, ĉar li, iama sporta instruisto, klare komprenis la rilaton inter sporto kaj intelekto. Ren Yuxiang, Wang Tairan kaj aliaj lernantoj ŝatis ludi volanon, li do ludis kune kun ili, kuraĝigante ilin lukti por ĉiu poento... Hejme li destinis unu ĉambron por siaj lernantoj. Preskaŭ ĉiutage en postlecionaj horoj li ripozigis ilin tie, prezentante al ili kafon. Tiel ili kune pasigis gajajn vesperojn.

Ĉiufoje antaŭ urba kaj tutlanda konkursoj de fiziko Zhang estis tre okupita. Li dediĉis multe da tempo al arango de la vivo de siaj lernantoj. Li zorgis pri ĉio ilia. Li trankviligis nur post kiam li vidis, ke ili bone manĝis kaj bone dormis. Ĉiufoje al konkursejo li portis grandan sakon plenan de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, eĉ mantukojn kaj sapojn li ne forgesis.

Siavice la lernantoj ne malesperigis sian instruiston. De 1985 ĝis hodiaŭ li 7-foje diplomis superajn mezlernejojn kaj la lastaj ĉiuj estis elstaraj en fiziko. En 1991 per la meznombra poentaro de fiziko 109 (la plena poentaro estas 150) lernantoj de la Dua Dependaj Mezlernejoj de Orient-Ĉinia Universitato gajnis la unuan lokon el la ŝanhajaj mezlernejoj kaj en 1992 liaj lernantoj de 2 grupoj altigis la meznomb-

bran poentaron al 123. Nun la Eduka Komisiono de Ĉinio aprobis, ke la lernejo funkciigos fizikan kurson, kies lernantoj venos el diversaj lokoj de la lando. Tio signifas, ke Zhang instruos fizikon al pli multe da mezlernejoj.

En tiuj jaroj, krom intensa instruado, Zhang ankaŭ eldonis 6 librojn unuope aŭ kunlabore kun aliaj. Kiel ĉefredaktoro, li aperigis milion-ideograman referencan libron "Fizikaj Eksperimentoj por Mezlernejoj". Lastatempe li verkis disertaĵojn, kiaj "Pri Eduko de Elstaraj Lernantoj" kaj "La Psikologia Eduko Estas Ŝlosilo de Kulturo de Fizikaj Eminenculoj". 43-jara, li akiris la rangon de mezlerneja supera instruisto (kiel vicprofesoro). En 1991 li gajnis "Premion de Ĝardenisto" de Ŝanhajo. En 1993 li gajnis premion de la Stipendio TD Lee, fama ĉindevena usona fizikisto, gajninto de Nobel-premio. Ĝis nun inter la ĉinaj mezlernejaj instruistoj nur li ricevis tiun honoron. ■

Klasikaj noveloj

de HOU JUELIANG

ANTAŬ 1 500 jaroj klasikaj noveloj de Ĉinio estis en ĝermado. La tiamaj noveloj estis mallongaj, el kelkcent aŭ dumil ideogramoj. Laŭ la enhavo la noveloj dividiĝis en du kategoriojn. Unu el ili temas pri dioj kaj demonoj, kun *Notoj pri strangajoj* kiel la reprezentanta verko, kaj la alia pri personoj, kun *Freŝaj tezoj kaj anekdotoj de la nuna mondo* kiel la reprezentanta verko. La verkoj de ambaŭ kategorioj ne povis speguli la socian vivon en ĉiuj flankoj, sed ili jam portis karakterizaĵojn de novelo, nome konigi la karakteron de herooj en la verkoj. Ekzemple, en *Freŝaj tezoj kaj anekdotoj de la nuna mondo* la verkinto priskribis la senpacienca karakteron de Wang Shu. Kiam li ne povis preni ovon per manĝbastonetoj, li koleriĝis, kaj kiam la ovo falis teren, li surtretis ĝin. Alia persono en la verko estis kortegano Huan Wen. Li ofte timis, ke oni mokos lin pro lia sentaŭgeco. Li diris, ke li preferas malbonfami, se li ne povos bonfamigi tra la postaj generacioj. Tio vivece figuris la politikistaĉon.

En la 8-a jarcento aperis legendaj noveloj. Ili estis relative longaj, la intrigo estis zigzaga, la vortoj helaj, kaj la herooj havis siajn proprajn trajtojn. Iuj el la noveloj temas pri mitoj, kaj la granda parto de ili priskribas la staton de la socio; la etoso de la vivo estas intensa, la intrigo komplika. Tia estas la novelo *Biografio de Liu*

Yi, kiu rakontas pri filino de la drakoreĝo. La drakoprincino estis edzinigita al malproksima drakoprincino, sed ŝi estis molestata kaj devis paŝti ŝafojn. Foje, ŝi renkontiĝis kun helpema junulo Liu Yi kaj estis savita. Kiam ŝi revenis al sia patro, la drakoreĝo volis edziniĝi ŝin al Liu, sed Liu fordankis la afablecon de la drakoreĝo. Li opiniis, ke li helpis la drakoprincinon el justamo, sed ne el egoisma deziro. Lia nobla virto vekis ĉe la drakoprincino pli ardan amon kaj kategorie decidis edziniĝi ekskluzive al li. Kaj fine ili geedziĝis.

Post la 10-a jarcento, dank' al la evoluado de komerco, plimultiĝo kaj pligrandiĝo de la urboj, aperis socitavolo de civitanoj. Ili deziris legi literaturaĵojn pri la reala vivo por trovi sian figuron en la verkoj. Tiam naskiĝis grandnombraj sekularaj noveloj surbaze de popola rakontado, kiujn oni nomis monologlibroj. La reprezentantaj verkoj estas *Rakontoj por veki la homojn*, *Rakontoj por averti la homojn* kaj *Rakontoj por ilumini la homojn*, *Unua serio da amuzaj rakontoj* kaj *Dua serio da amuzaj rakontoj*. En tiuj kvin libroj kolektiĝis pli ol 200 noveloj. Tiuj interesaj rakontoj amplekse spegulas la socian vivon kaj konigas diversajn figurojn. Sed ili akcentas la intrigon kaj neglektas priskribon de personoj kaj medio.

En la 15-a jarcento senprecedence prosperis la klasikaj nove-

loj de Ĉinio, kion markis apero de multaj verkistoj kaj verkoj. Aparte mirinde estis, ke aperis multe da romanoj, kiuj vaste spegulis la historian kaj aktualan vivon kaj plene montris la socian rolon de klasikaj noveloj. Tio rompis la monopolon de poezio kaj prozo super la ĉina literatura kampo.

La rakontoj en romanoj unue cirkulis en la popolo, poste ili estis poluritaĵoj de literaturistoj. Ĉiuj romanoj sukcese modlis la figurojn kaj trovis ŝaton ĉe multaj ĉinoj. La historia romano *La tri regnoj* modlis tre multajn figurojn. Tre sukcesa estis la modlado de la figuro de Zhuge Liang, tre fama ĉefministro de Shu-regno. Por la ĉinoj li estis enkorpiĝinto de saĝo kaj modelo de korteganoj. Li tutkore dediĉis sin al unuigo de la lando kaj ĝuis respekton tra la postaj generacioj. Alia romano *Ĉe la akvorando* rakontas pri insurrekcio de kamparanoj gvidata de 108 bravuloj. Ili batalis kontraŭ la kortego kaj helpis malriĉulojn. La tria romano *Pilgrimado al la okcidento* rakontas pri simioreĝo Sun Wukong, la enkorpiĝinto de forto. Li kapablis transformiĝi en 72 figurojn kaj neniu feroca diablo aŭ demono povis eskapi el lia puno.

Aparte menciinda estas la romano *Jin Ping Mei*. Ĝi ne estas varianto de popola rakonto, sed kreaĵo de literaturisto. La herooj kaj la intrigo estas nedisigeblaj de la reala vivo. La romano malka-

ŝas la putriĝon de la feŭda reganta klico. Ximen Qing, heroo de la romano, havas ses edzinojn. Li estas kaj riĉa komercisto kaj tirano komplotanta kun regantoj. La aŭtoro vipis liajn fiagojn kaj bone priskribis la psikon de la herooj. La romano markis la maturiĝon de la ĉinaj klasikaj noveloj kaj multe influis verkadon de postaj romanistoj.

Iuj kritikistoj opinias, ke *Jin Ping Mei* antaŭiris en la psika priskribado de klasika romano de Ĉinio. Ĝuste ĉi tiu romano edifis la aŭtoron de la fama romano *Sonĝo en ruĝa buduaro*. Ambaŭ romanoj bone priskribas la psikon de la herooj de la verkoj. Sed la dua superis la unuan tiuflanke, ke ĝia ideologio kaj arto reprezentis la kulminon de ĉina klasika novelo.

Sonĝo en ruĝa buduaro el 1.2 milionoj da ĉinaj ideogramoj estis verkita de Cao Xueqin (Cao Ŝjueĉin) en la 17-a jarcento. La antaŭaj du trionoj de la romano estis verkitaj de Cao mem, kaj la lasta triono estis aldonita de Gao E laŭ la skizo de Cao, ĉar tiu lasta forpasis antaŭ ol fini la verkadon.

Cao Xueqin devenis de familio de altranga oficisto, kiu prosperis plurajn generaciojn. Sed en la tempo, kiam lia patro vivis, ĝi dekadencis kaj sin nutris sole per kaĉo. La aŭtoro, estinta sinjorido, fariĝis mizerulo. Li multe spertis la tragikecon de la dekadenciĝo de granda feŭda familio kaj kun larmoj en la okuloj verkis la romanon *Sonĝo en ruĝa buduaro*. La tragedia romano prezentas la tragikan amon de la geherooj Jia Baoyu kaj Lin Daiyu, la tragikan geedziĝon de Jia Baoyu kaj Xue Baochai, la malfeliĉan pereon de la granda familio de Jia kaj ankaŭ la tragikajn sinmortigojn de servistinoj en la domo de Jia, kiuj ne povis elteni turmentadon kaj humiligon.

La gepatroj de Jia Baoyu devigis lin studi kaj karieradi, por ke li fariĝu daŭriganto de la afero de



Geherooj de "Sonĝo en Ruĝa Buduaro"

la familio. Sed li tute ignoris tion, klopodis por emancipo de persono kaj por libero de pensado kaj staris kontraŭ la feŭdismaj etikoj. Li enamiĝis al Lin Daiyu, kiu tute malestimis la feŭdismajn etikojn. Sed la feŭdismaj patriarkoj kategorie edzigis lin al Xue Baochai, filino de granda mandarenokomercisto, kiu multe interesiĝis pri gloro kaj riĉeco. Do okazis malfeliĉo neevitebla: Ĝuste kiam Jia Baoyu estis trompe kondukita en la ĉambron por la novgeedzoj, Lin Daiyu faris la lastan spiron post sangosputado pro longdaŭra malsano. En granda malĝojo Jia Baoyu forlasis la hejmon kaj bonziĝis. Ĉirkaŭ la tragikaj amo kaj geedziĝo okazis aliaj tragedioj: iuj servistinoj dronigis sin en puto, aliaj sin venenis, kaj kiam la patro de Jia Baoyu estis arestita kaj la domo estis traserĉita, la familianoj aŭ mortis de terurigo aŭ fuĝis, kaj kolapsiĝis la granda familio.

La romano *Sonĝo en ruĝa buduaro* estas spegulo por la lasta periodo de la feŭda socio de Ĉinio. Ĝi malkaŝis la mallumon kaj putriĝon interne de la granda feŭ-

da familio kaj montris la tendencan de la definitiva pereon de la feŭda socio. Ĝi estas kaj viva historia instrumaterialo kaj plastika ĝenro pri la socia vivo. La romano estis adaptita al filmo kaj televida filmo-serio. Por memori pri la aŭtoro oni konstruis la parkon Daguan Yuan laŭ la priskribo de la aŭtoro pri la granda domo de Jia-familio en la romano.

Post *Sonĝo en ruĝa buduaro* aperis multaj verkistoj. La novelaro *Mirrakontoj de Liaozhai* prenas fantomojn kaj vulpospiritojn kiel heroojn en la noveloj, kiuj ne rekte spegulas la realan vivon. La romano *Biografioj de kleruloj* pike mokas la senhontajn farojn de vantaj kleruloj. Tiuspeca sarkasma literaturo plene evoluis en la fino de la 19-a jarcento kaj naskiĝis nombro da noveloj vipantaj la obskuran socion, kion ekzemplis la romanoj *Skandalaj viditaj en 20 jaroj* kaj *Nudiĝo de mandarena mondumo*. Tiuj romanoj strikte rilatis kun la epoko kaj levis la kurtenon por la naskiĝo de modernaj noveloj de Ĉinio en la 20-a jarcento. ■




Rikoltado de tritiko

de Laboras ETTU SICCOINE

Rikoltado de tritiko

Dum tritika rikoltado mi vizitis Yangsong-urbon de Huairou-gubernio en nordorienta Pekino. Ekde la printempo preskaŭ ne pluvis en la loko. La lokanoj alprenis efikajn rimedojn kaj venkis la longtempan sekecon. La 1 300-hektara tritiko prosperas kaj donis bonan rikolton.




En labor-paŭzo





Tritikaj grajnoj sunumataj

Kolektado



Antaŭ draŝmaŝino



Pri masaĝo

En la lastaj jaroj en nia revuo aperis artikoloj pri masaĝo. Iuj legantoj sin kuracis per masaĝo kaj rikoltis certan efikon, aliaj skribis al ni kun la deziro pli multe koni masaĝon, la tradician ĉin-medicinan terepion. Tiucele ni aperigos la suban artikolon kaj esperas, ke ĝi helpas vin.

La Red.

EN la frua periodo de sia ekzistado la homoj trovis, ke masaĝo povas mildigi kaj eĉ forigi doloron. Ili do komencis uzi ĝin en la praktiko. Tial ĝi fariĝis unu el la plej antikvaj kurac-metodoj kaj fine aparta terapio de Ĉinio. Antaŭ 2 000 jaroj masaĝo ekhavis sian lokon en la tradicia ĉina medicino.

Masaĝo estas fizika kuracado. En praktiko oni permane frotas kaj premas eksterajn partojn de la homa korpo por reguligi la fiziologiajn kaj patologiajn funkciojn de la koncernaj organismoj. Dank' al sia kreskanta profundigo de konado pri medicino, oni iom post iom vidis la kurac-efikon de naturaj medicinaĵoj. Poste aperis kemiaj kaj biontaj medicinaĵoj, kio markis la progreson de medicino. Tamen, ĝenerale dirite, medicinaĵoj havas ankaŭ malutilan flankon. Sekve, naturaj kuracadoj fariĝas ĉiam pli alte taksataj. masaĝo estas unu el ili.

Masaĝo donas apartan benefikon al kuracado de vundiĝo aŭ leziĝo kaj ankaŭ al kuracado de iuj internaj malsanoj kaj malsanoj de neŭrologio, ginekologio, pediatrio k.a., sen malutila rezulto. Masaĝo estas efika ankaŭ por kuraci akutajn malsanojn, ekz., artefarita spirado por urĝa savo.

Per kio masaĝo efikas sur la homan korpon? Modernaj fiziologoj konstatis post esploro, ke ĉiu homa organo havas sian propran bioinformon. Kiam ĝi malsaniĝas, ŝanĝiĝas ankaŭ la koncerna bioinformo. La masaĝo povas eksciti koncernajn korpopartojn kaj transdoni energion al tiuj lokoj, kiuj estigas bioinformon kaj transsendas ĝin al la organo pere de la transsenda sistemo de informo, por reguligi la funkcion de la organo. Iafoje, luksacio kaj deglitiĝo de tendeno povas esti reĝustigitaj per masaĝo. Krome, masaĝo estas utila ankaŭ en beligado. Ĝi povas fari haŭton brileta kaj elasta.

La kurac-efiko de masaĝo baziĝas ĉefe sur la doktrino de ĝinglŭo-vojoj de la tradicia ĉina medicino. La ĝinglŭo-vojoj interkruciĝas kaj interligas ĉiujn partojn de la homa korpo kaj tra ili cirkulas vitala energio. Perturbo de vitala energio kaŭzas malfunkcion de la visceroj kaj ĝinglŭo-vojoj. "Neijing (Nejĝing)", la plej frua medicina libro de Ĉinio, havas en si noton pri masaĝa kuracado surbaze de la doktrino de ĝinglŭo-vojoj. Ekzemple, se la dorso estas atakata de interna malvarmo kaj eksteraj patogenaj faktoroj, do oni havas pezan pulsadon kaj suferas de la korpa malforteco. Se tiam oni faras masaĝon al la malsanulo,

tio forigos la obstrukcadon de la ŝvitglando, glatigos ĝinglŭo-vojojn, rapidigos sangocirkuladon, varmetigos la dorson kaj ĉesigos la malvarmon. Jen kvietiĝos la doloro.

Medicinaj libroj de Ĉinio diras, ke praktikiĝas almenaŭ centoj da masaĝ-metodoj. Ofte uzataj estas puŝado, kaptado, premado kaj frotado. Antaŭ ol masaĝi, oni devas fari ĝustan diagnozon. Por atingi idealan rezulton de kuracado, oni devas lerni fundamentajn teoriojn de la ĉina kaj eŭropa medicinoj kaj multe sin ekzerci en praktiko por masaĝi pli efike.

Kompreneble, masaĝo ne estas ĉiopova. Ĝi bonefike kuracas aŭ mildigas nur iujn malsanojn. Ĝi ne taŭgas por malsanoj, kiaj maligna tumoroj, akuta infekta malsano, serioza kormalsano, grava hepat-malsano, akutaj frakturoj kaj leziĝoj kaj ĉiuj dermozoj. Oni ne devas fari masaĝon ankaŭ al gravedulinoj kaj virinoj en menstruo.

Masaĝo estas facile lernebla kaj praktikebla. Se iu lerte posedas kuracadon de iuj oftaj kaj ripetigeblaj malsanoj per masaĝo, do li povas masaĝi hejme siajn familianojn, kiam ili estas malsanetaj aŭ ne grave vunditaj. Ankaŭ suferantoj de kronika malsano povas esti resanigitaj per masaĝo. ■

Sub la rubriko mi konigos masaĝ-metodojn kontraŭ iuj oftaj malsanoj.

Por atingi la kontentigan efikon oni devas bone scii akupunkturajn punktojn kaj taŭgajn masaĝ-metodojn. Ĉi-sube mi konigos kvar ofte uzatajn metodojn.


1. **PUŜADO.** Metu fingrojn aŭ manplaton sur koncernan korpoparton aŭ akupunkturajn punktojn kaj puŝu ilin en rekta aŭ arka direkto. Estas kelkaj masaĝ-metodoj tiurilate. Ĉi tie mi konigos nur la ebenan. Farante puŝadon, oni devas forte premi la masaĝatan korpoparton. Faru la puŝadon stabile kaj malrapide. Sur la malsamaj korpopartoj kaj kontraŭ diferencaj malsanoj oni devas fari la ebenan puŝadon per dikfingro, manplato, pugno kaj kubuto (Bildo 1). La puŝado celas ĉefe glatigi ĝinglŭo-vojojn, vigligi la sang-cirkuladon, nuligi la kongestaĵon, mildigi la spasmon kaj kvietigi la doloron.

2. **KAPTADO.** Faru la dikfingron kaj aliajn fingrojn tenajloformaj. Kaptu kaj tiru la koncernajn korpopartojn, komence malforte kaj poste forte. Denove, inverse. Kaptu, tiru kaj turnu la koncernajn korpopartojn kontinue (Bildo 2). La kaptado celas ĉefe glatigi ĝinglŭo-vojojn, disigi la malvarmon kaj likvidi la patogenajn faktorojn, vigligi la spiradon kaj sang-cirkuladon, disigi la adheraĵon, kvietigi la doloron kaj mildigi la spasmon.

3. **PREMADO.** Metu fingrojn aŭ manplaton sur koncernan korpoparton aŭ akupunkturajn punktojn. Vertikale premu la lokon komence malforte kaj poste forte, stabile kaj kontinue, por ke la ekscito atingu profundon de la organismo. Atentu, ke vi neniel premu abrupte. La premado donas fortan eksciton. Ĝi estas aplikata ofte kun knedado por kombini fortecon kun mildeco. Oni povas premi per fingroj aŭ per manplato (Bildo 3). La premado celas ĉefe forigi la patogenan obstrukcon de la in-

POR VIA SANO

Masaĝo en la ĉiutaga vivo (I)



ternaĵoj, disigi la malvarmon, kvietigi la doloron kaj glatigi ĝinglŭo-vojojn.

4. **FROTADO.** Per manplato aŭ palpoflanko de la montra, meza kaj ringa fingroj faru ritman ringforman frotadon al koncerna korpoparto. Tio estas la plej milda masaĝo. Farante la frotadon, vi devas flekseti la kubuton

kaj malstreĉi la pojnon. Frotu milde kaj rondforme ĝis varmiĝo de la korpoparto (Bildo 4). La frotado celas ĉefe reguligi la funkcion de la stomako kaj fluadon de vitala energio, likvidi la dispepsion, bone funkciigi la digestajn organojn, varmetigi ĝinglŭo-vojojn kaj vigligi ilian funkcion, mildigi la spiradon kaj akceli la sang-cirkuladon. ■

Ĝenerala, Organika kaj Biologia Kemio estas 575-paĝa lernolibro dediĉita al la junuloj de la 3-a Mondo. Ni sendos ĝin ĝis elĉerpiĝo senkoste al Esp-organizoj tie. Sendu petleterojn al R.K. Jones, 5048 N. Marine, D-6, Chicago, IL 60640, Usono.

EKONOMIO

● Nova ĝenerala plano de Pekino estas sankciita de la ĉina registaro: Ĝis la jaro 2010 la totala nacia produktovaloro de Pekino kvarobligos kompare kun tiu de 1990, ĝia konstanta loĝantaro limiĝos je ĉ. 12.5 milionoj, formiĝos kvarnivela urbosistemo: urbaj kvartaloj — satelitaj urboj — guberniaj urboj — ordinaraj urbetoj; estos zorgeme protektataj la aksa linio de la urbo, la T-forma konturo de la malnova urbo, la malnova sistemo de riveroj kaj lagoj, la antaŭa ŝaktabul-forma reto de la ŝoseoj, la aranĝo de stratoj kaj stratetoj kaj la tradiciaj koloroj de la konstruaĵoj; konstruiĝos en la urbo plene fermita trefkruciĝa sistemo de aŭtovojoj el 4 rondŝoseoj, 10 ĉefaj radiantaj ŝoseoj kaj 15 akcesoraj radiantaj ŝoseoj; la pokapa loĝareo atingos 11 kvadratajn metrojn. Tiam ĉiu familio havos unu apartamenton kun telefono. Interne de la tria rondŝoseo estos senfuma regiono. 70% de la domoj estos koncentre hejtitaj. Ĉiu urbano posedos 10 kvadratajn metrojn da verda tero. Konstruiĝos unuaklasa brodkasta kaj televida sistemo kun 10-12 kanaloj.

● En Tibeto estos 28 entreprenoj, kiuj estos kune investitaj kaj administrataj de Tibeto, Usono, Nepalo, Tajlando, Malajzio, Hongkongo kaj Taiwan, kun interkonsentita investo de 9.63 milionoj da usonaj dolaroj. 16 aliprovincaj entreprenoj funkcios en Tibeto. Funkcios tie 20 entreprenoj kune administrataj de Tibeto kaj aliaj provincoj. Ili ĉefe okupiĝos pri transportado, malpeza industrio, tekstila kaj elektronika industrio kaj komercado.

● 150 000-tonela loza kargoŝipo, projektita de la Dalian-a Ŝipa Instituto kaj konstruita de la Dalian-a Ŝipkonstruejo en la Nordoriento de Ĉinio estis transdonita al la ŝipmendinto Belgio antaŭ nelonge.

Por fari la plej grandan eksportan kargoŝipon de Ĉinio, oni laboris laŭ la ŝipfaraj teknikaj normoj, la plej novaj de la ŝipklasifika societo internacie. Koncerne la malfacilajn problemojn pri ĝenerala fortikeco de la ŝipo ankoraŭ nesolvitajn en la mondo, oni



alprenis novajn preventajn teknikojn kaj rimedojn, kiaj avangarda memstiranta kajuto kaj sekuriga sistemo sur maroj de la tuta terglobo.

● De 1983 la Wuhu-a Fabriko de Aŭtaj Instrumentoj, elita entrepreno de la Ĝenerala Kompanio de la Ĉina Aŭta Industrio, dufoje importis ŝlosilajn ekipaĵojn el la kompanio VDO, la plej granda translanda kompanio de aŭtaj instrumentoj de Germanio. Ĉinaj instrumentoj por la aŭtoj kun markoj Suzuki, Nissan, Chevrolet, Peugeot k.a. jam ekvendiĝis en la merkato. La germana kompanio VDO investis 5 milionojn da usonaj dolaroj kaj kune kun la Wuhu-a fabriko fondis entreprenon produktantan instrumentojn de aŭtoj. Tio estas ĝia unua kune investita entrepreno en Ĉinio.


● En la lastaj 15 jaroj Ĉinio konstruis ĉ. 100 domegojn pli ol cent metrojn altajn. Inter ili 26 estas en Ŝanhajo. Jinguang-centro en Pekino estas la plej alta (208 m) kaj la ĉefa domo de la Guangdong-a Internacia Domego konsistas el plej multaj etaĝoj (surtere 63 etaĝoj kaj subtere 4 etaĝoj).

La domegoj servas kiel loĝdomoj, hoteloj, oficejoj k.a.

● “Ĉina Urbo” estas konstruita en Little Rock, ĉefurbo de la ŝtato Arkansano de Usono, naskiĝloko de la usona prezidento Clinton.

La “Ĉina Urbo” estas kune konstruita de la Limigita Kompanio Aglo, kies ĝenerala oficejo sin trovas en Little Rock, kaj la Ĉina Komerca Asocio. Ĝi estas destinita por disvolvi komercadon inter Ĉinio kaj Usono, ekspluati altajn kaj novajn teknikojn kaj akceli prosperiĝon de la loĝkvartalo de ĉinoj. En 5 jaroj tie

Jinguang-centro en Pekino



Estro de la direkto de la kompanio VDO (meze) en la Wuhu-a Fabriko de Aŭtaj Instrumentoj

enloĝigos 500 ĉinaj familioj kun 2 000 homoj kaj dekoj da kompanioj kaj fabrikoj, okupiĝantaj pri komercado inter Ĉinio kaj Usono kaj produktantaj varojn de novaj teknikoj.

- Peco de turkiso, kiu longas je 82 cm, larĝas kaj altas je 29 cm respektive kaj pezas je 66.2 kg, estas elterigita antaŭ nelonge en la monto Yungai je pli ol 1 200 m super la marnivelo en Yunxian-gubernio, Hubei-provinco.

Turkiso, simila al pinkonuso kaj en formo kaj en koloro, estas unu el la raraj gemoj. Yunxian-gubernio estas fama produktejo de turkiso, ĝiaj produktaĵoj vendiĝas en pli ol 30 landoj kaj regionoj de Eŭropo, Ameriko, Hongkongo kaj Aomen.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Ĉinaj sciencistoj determinis, ke la kanjono de la rivero Yarlung Zangbo, 5 382 m profunda, en la interno de Tibeto estas la plej profunda kanjono sur la terglobo. Ĝi estas multe pli profunda ol la Granda Kanjono de Kolorado, Usono, kiu profundas je 2 133 m, kaj la Colca Kanjono de Peruo, kiu profundas je 3 200 m.

Ĉinaj geologoj plurfoje iris tien por fari esploron pri la tieaj geologio, topografio, flaŭro, tralasa kvanto de akvo kaj aero k.a. La rezulto de ilia esplorado estas fidinda. Laŭ la topografia mapo kaj aermapo en skalo de 1:50 000, ili faris serion da sekcoj kaj kalkuloj, la rezulto montras, ke la sekco de la kanjono meznombro profundas je pli ol 5 000 m. La kanjono longas 370 km kaj larĝas 80-200 m. Ĝia plej malgranda larĝo de la fundo estas 74 m. Ĝi estas ankaŭ la kanjono, kiu situas plej alte super la marnivelo en la mondo. Pro torenta riverakvo ĉe iuj lokoj, neniu sukcesis piede trapasi ĝin.

- En la lastaj jaroj Ĉinio havis rimarkindan progreson en meteologia observado. Meteologia departemento starigis pli ol 2 500 surterajn meteostaciojn, 100 observejojn pri sunradiado kaj du meteostaciojn Changcheng kaj Zhongshan en Antarkto.

- Lingva horloĝo estis sukcese farita de la Tianjin-a Civilaviada Instituto de Ĉinio. Se oni, je malpli ol 5 m for de ĝi, demandas ĝin pri la tempo per pekina dialekto aŭ la komuna parollingvo, ĝi, lumigante sian flavan lampon, precize respondas, ne ĝenate de la ĉirkaŭa bruado. Fakuloj opiniis, ke la sukcesa esploro de tia horloĝo ne nur pretigis la vojon por fari tiuspecan horloĝon en aliaj lingvoj, sed ankaŭ donis novan pensmanieron por ŝaltilo de hejmaj elektraĵoj kaj maŝinoj.

KULTURO

- Eldoniĝis la "Granda Ĉina Vortaro" en 12 volumoj, kune kompilita de altaj lernejoj, institutoj kaj eldonejoj de Shandong, Jiangsu, Anhui, Zhejiang.

Fujiang kaj Ŝanhajo. Kaj baldaŭ aperos ĝia indekso. La vortaro enhavas pli ol 375 mil artikolojn kun ĉ. 50 milionoj da ideogramoj kaj 2 253 bildoj. La kompilintoj, surbaze de kolektado, ordigado kaj analizado de granda kvanto da lingvaj materialoj, faris ampleksan, sciencajn kaj historian resumon pri handlingva evoluado. Ĝi aperis kiel riĉa rikolto de la kultura, akademia, eduka kaj eldona rondo de Ĉinio.


- La brodkasta kaj televida turo Orienta Perlo 460 m alta naskiĝis antaŭ nelonge ĉe la rivero Huangpu en Ŝanhajo.

La anten-stango de la turo longas je 110 m kaj pezas 450 tunojn. La projektantaj kaj konstruantaj unuoj adoptis tutecan suprenlevan metodon, t.e. "pezoelteno per ŝtalaj kabloj, levado per hidraŭlikaj leviloj kaj sinkrona regado per komputero", kaj sukcese fiksas tiel grandiozan anten-stangon sur lokon 350 metrojn altan por instalo.

- La koloraj argilaj figuroj "Cent ĉinaj imperiestroj" estis elfaritaj de la popolaj artistoj Xu Yaliang kaj Shen Xiaoda, antaŭ nelonge en Shengxian-gubernio de Zhejiang-provinco. Per versimila plasto kaj ornamaj koloroj ili kreis figurojn de cent imperiestroj en la 5 000-jara historio de Ĉinio.

MEDICINO

- Guxi-kapsulo, biofermenta medicinaĵo, inventita de la Medicina Biologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, estas produktita de la Tonghua-a Baishan-a Farmacia Fabriko kaj aplikata en kliniko.



Argilaj figuroj de ĉinaj imperiestroj

Guxi-kapsulo enhavas riĉajn kontraŭkancerajn kaj nutririĉajn elementojn, kiaj organikaj seleno, zinko, fero kaj diversaj aminoacidoj. Ĝi estas utila al pulmoj, produkto de substancia fluido kaj vigligo de sang-cirkulado, al la cerba kaj miokardia funkcio. Ĝi povas malhelpi kreskon de tumoro. Ĝi estas efika ankaŭ por kuraci kormalsanon, virusan hepatiton, cerban arteriosklerozon, katarakton kaj diabeton. Ĝi estas uzata ankaŭ en kuraco de malpliigo de leŭkocitoj kaŭzita de radiado kaj kemiterapio.

Argilaj ludiloj de Yutian

de LI QIANG



Liu Guangtian (maldekstre) kaj kolektanto de argilaj homfiguroj

LA nomitaj ludiloj havas ĉiu siajn proprajn trajtojn. La arto por fari argilajn ludilojn herediĝas generacio post generacio. La artaĵoj estas farataj kadre de familio, vilaĝo, subdistrikto kaj gubernio. En Ĉinio cirkulas diroj, kiaj “familio de argilaj homfiguroj” kaj “vilaĝo de argilaj ludiloj”. En Hebei-provinco estas kelkaj tiaj vilaĝoj kaj ĝuas grandan renomon la argilaj ludiloj de Yutian-gubernio de la provinco.

La modlitaj argilaj ludiloj de Yutian estas bele koloritaj. Laŭ la formoj estas du specoj de argilaj ludiloj globaj kaj reliefaj. La versimilaj argilaj pavo, anasoj, kokoj, ranoj kaj aliaj bestetoj estas plejparte kneditaj. La homfiguroj, kiaj simioreĝo Sun Wukong, oficistoj, militistoj, talentuloj kaj knabinoj, estas plejparte reliefaj, simple konturitaj kaj bele koloritaj. La homoj viglas sur iom pufigita fono. La plej tipaj estas argilaj beboj, herooj de popolaj rakontoj kaj roloj de teatroj. La argila ludilo “Knabo sur unukornulo” simbolas feliĉon kaj bonaŭguron: “Porko Bajie (Baĝje) kun edzino sur la dorso”, farita laŭ mita romano “Pilgrimado al la Okcidento”, romantike interesas la rigardantojn. La argilaj “Ok Feoj” prezentas ok feojn kun malsamaj seksoj, aĝoj, mienoj kaj vestoj. Iuj argilaj ludiloj, kiujn ŝatas infanoj, havas sur si fragmitan fajfilon kaj serene sonas je ekblovo.


Mi iam vizitis en Yutian metiartiston Liu Guangtian. Li estas ordinara kamparano. Liaj verkoj estis plurfoje prezentitaj en tutlanda aŭ provinca ekspozicio de popolaj metiartaĵoj kaj iuj el ili estis honoritaj per granda premio. Alilandaj turistoj aĉetas liajn verkojn kiel memoraĵojn kaj portas hejmen.

En la domo de Liu Guangtian amasiĝis argilaj

formuoj. Iuj el ili estis faritaj de lia patro Liu Junxiang. Lia avo Liu Kai transloĝiĝis de Shandong al Hebei kaj vivis tie de terkulturado. Li estis lerta en farado de pentraĵoj kaj faris el argilo malgrandajn ludilojn en postlaboraj horoj. En sia infanaĝo Liu Junxiang komencis fari argilajn homfigurojn kaj post longa tempo ekhavis sian propran artan stilon. Liaj argilaj homfiguroj estis multe ŝatataj de la kamparanoj. Li estas konata kiel fama artisto de argilaj metiartaĵoj en Hebei-provinco.

Komence Liu Junxiang knedis argilajn homfigurojn kaj poste li faris ilin per argila formujo. Por pretigi tiajn ludilojn necesas antaŭ ĉio fari el argilaj buloj maldikajn platojn kaj tranĉe fari ilin similaj al modelo. Poste oni devas ŝuti pajlan cindron sur la parieton de la formujo, enpremi la argilajn platojn en ĝin kaj strikte ŝtopi la fendon inter la du partoj de la formujo, kiam ili estas kunigitaj, por ke ne vaporigu la akvo tenata en la platoj. Kiam la argilaj platoj estas sorbintaj la akvon, oni devas malfermi la formujon. Post sekiĝo de la argilaĵo oni ĝin blankigas unue kaj poste alikolorigas. Post tio oni faras desegnojn sur la argilaĵo kaj pentras la vizaĝon antaŭ ol laki ĝin per verniso. Jen estiĝas aminda ludilo.

Siatempe la argilaj ludiloj de Yutian estis tre ŝatataj de la kamparanoj. Multaj alilokaj komercistoj tie pogrande aĉetis argilajn ludilojn. Yutian fariĝis hejmloko de argilaj ludiloj en norda Ĉinio kaj multaj lernis de Liu Junxiang la arton. Li entuziasme instruis sian metiarton ne nur al sia filo, sed ankaŭ al samvilaĝanoj. Ifoje li donis formujon al samvilaĝanoj, tial preskaŭ ĉiuj familioj de lia vilaĝo okupiĝis pri farado de argilaj ludiloj. Ankaŭ en la ĉirkaŭaj vilaĝoj aperis tiaj metiistoj. En la komenco



“Kato kaptas fiŝon.”



“Knabo sur unukornulo”


de la 50-aj jaroj la argilaj ludiloj de Yutian atingis sian kulminon de la disvolviĝo kaj donis ĉiam pli grandan influon. Tiam estis pli ol 300 specoj da argilaj ludiloj kaj butikoj por vendi ilin staris unu apud alia sur strato 0.5-kilometre longa. Komercistoj

el Tianjin, Pekino kaj nordorienta Ĉinio aĉetis tie centojn da miloj da argilaj ludiloj ĉiujare.

Nun Liu Guangtian ne plu sin vivtenis per farado de la artaĵoj, sed en liberaj horoj li faras argilajn ludilojn por si mem aŭ por amikoj. ■

Argilaj homfiguroj el antikva ĉina mito





Akvofalo Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九四年第九期
(本刊代号: 二——九一五) 国内统一刊号: CN11 1339 / G2